


ISSN 0023-3692

KIATAKO

NUMERO 199 (2004:1)



arto



Jenja kaj Joel en Kievo

Saluton kaj bonvenon al la unua *KONTAKTO* 2004! Bedaŭrinde, ankaŭ ĉi-jare ĝi atingis vin kun sufiĉe signifa maŭruo... Antaŭ ĉio tio okazis pro laboro en mia nova posteno (en la ukrainia turisma ministerio) kaj ties konstantaj ofiĉvojaĝoj...

Ĉi-jare la tuta mondo festas la centjaran jubileon de la naskiĝo de Salvador DALI – eble, la plej fama kataluno (li naskiĝis la 11an de majo 1904; pri li ni skribos iom poste). Iuj konsideris lin frenezulo, kaj nun liaj verkoj, iam ĝispinte modernaj, estas klasikaĵoj. Strangege, ĉu ne, ke ĝuste du monatojn antaŭ tiu ĉi datreveno okazis en Hispanio tiel ŝokaj teroratakoj... Kiom multe da koincidoj (kaj ĉu vere koincidoj?)... Kaj denove ni vidas la nombron "11". Post 911 tagoj... Sincerajn kondolencojn al Hispanio. Sincerajn kondolencojn al la tuta mondo...

La jubileo de DALI, cetere, estis unu el la kialoj, kial ni elektis ĝuste arton kiel ĉeftemon de tiu ĉi numero. Pri moderna arto esprimas siajn opiniojn Anna LÖWENSTEIN (Italio) kaj Sergej TIMĈENKO (Ukrainio). Tiuj opinioj estas cetere tute malsamaj: Anna ne povas kompreni, ĉu vere en la mondo ekzistas ŝatantoj de verkoj, kiel, ekzemple, *La lampoj, kiuj ŝaltiĝas kaj malŝaltiĝas* (p.3). Sergej opinias, ke moderna arto ne imitas, sed kreas sian propran realecon (p.11). Sergej cetere estas skulptisto, aŭ "malskulptisto", kiel li mem nomas sin, kaj la plejmulto de la desegnaĵoj, kiuj aperas en *KONTAKTO*, estas faritaj de li.

Kial islamo ne permesas figuri homojn kaj bestojn? Pri tio ni promesis rakonti antaŭ kelkaj numeroj. Kaj jen – Behrouz SOROUSHIAN, Irano/Francio, klarigas tiun fenomenon (p.4).

Anatoli IONESOV, Uzbekio, estas jam konata al la legantoj de *KONTAKTO*. Mi rememorigu: li estas la direktoro de Pac-muzeo en Samarkando. Ĉi-foje li rakontas pri la historio de tiu ĉi antikva kaj bela centr-azia urbo (p.6-8).

Vi certe scias, ke ekzistas iuj triboj, kies anoj komunikigas per fajfado. Sed ĉu vi scias, ke ie en la mondo oni eĉ instruas fajfadon en lernejoj? (Nu, se oni instruas fajfadon en mia lando, oni, verŝajne, neniam fajfus pri ĝi!) Pri tio rakontas Marco TREVISAN, Hispanio (9).

La paĝoj 10-11 estas plene dediĉitaj al Afriko. Atendas vin du artikoloj pri Benino kaj unu el Togolando.

Ĉu vere la plejmulto da japanoj ŝatas anglismojn? Respondon proponas Marko Naoki LINS, Germanio/Belgio (p.12). Daŭrigas la temon nia vic-redaktoro, Joel, kiu laboris du jarojn en Japanio kiel asista angla instruisto. Li trovis, interalie, ke instruado de la angla lingvo en tiu lando estas vere tre malproksima de la idealo...

Ho, mi preskaŭ forgesis! Antaŭnelonge Joel fariĝis ĉef-redaktoro de *TEJO Tutmonde*, kiu ekde nun estos sendata kune kun *KONTAKTO*. Gratulojn, Joel! Kaj dankon al ĉiuj, kiuj kontribuis por tiu ĉi numero. Bonan legadon kaj – ne forgesu reaboni *KONTAKTO*-n por 2004, se vi ankoraŭ ne faris tion!

Jenja

<ENHAVO>

Jes, sed ĉu tio estas arto? (Anna LÖWENSTEIN, Italio)	3
Ikonrompisto antaŭaj kaj nuntempaj, aŭ: Kiam religio estas kontraŭ arto... (Behrouz SOROUSHIAN, Irano/Francio)	4
La urbo de via revo (Sergej TIMĈENKO, Ukrainio)	5
Anonce	5
Lando dezirata de la koro (Anatoli IONESOV, Uzbekio)	6-8
Fripulismo: bizareco, huliganeco aŭ arto? (Sergej TIMĈENKO, Ukrainio)	8
La gomera fajfado (Marco TREVISAN, Hispanio)	9
Akvo-fonto – danke al esperantistoj! (Jean CODJO, Benino/Kanado)	10
"Al afrikanoj ne mankas projektoj por plialtigi siajn viv-kondiĉojn. Mankas motivo!" (intervjuo kun Nadine Rivière) ..	11
Pigroboj (Pajto АУТО, Togolando)	11
Plejmulto da japanoj ŝajnas ami anglismojn, aŭ: La angla kiel defio kaj minaco (intervjuo fare de Marko Naoki LINS)	12
Reen al la 19a jarcento, aŭ: Kiel oni lernas la anglan en tipa mezlernejo. Impresoj de asista angla instruisto (Joel AMIS, Usono/Nederlanda)	13
Recenze: rekomendinda lernilo por progresantoj (Anna kaj Mati PENTUS, Rusio)	14
Bumerange: "Movada, sed altnivele!" (I.F. BOCIORT, Germanio) ..	14
Informe	15
Facilaj vortoj	16

Enkonduke

La sola trajto de vera arto estas originaleco; arto ĉiam kreas ion novan (V. BRJUSOV).

Arton oni devas senti, ne kompreni (I. GUBERMAN).

Vere granda kaj signifoplena arto devas ĝuigi ĉiujn.

Arto de kasto estas simple ludilo (S. MAUGHAM [moem]).

Plena sensecaĵo estas konsideri arton metio, kiun ĝisfunde komprenas nur la metiisto. Arto estas manifestajo de sentoj, kaj sentoj parolas la lingvon, kompreneblan de ĉiuj (S. MAUGHAM).

Arto estas mikroskopo, kiun artisto enfokusigas sur enigmojn de sia animo kaj montras tiujn, komunajn por ĉiuj, enigmojn al la homoj (L. TOLSTOJ).

Vera arto neniam mortos, kiu ajn politiko estu en ĝia grundo (E. HEMINGWAY).

Publiko en arto ŝatas tion, kio estas banala kaj konata al ĝi, al kio ĝi al kutimiĝis (A. ĈEĤOV).

Ĉiama noveco – tio estas valormezurilo de ĉiu artajo (E. EMERSON).

Temoj de la venontaj numeroj de *KONTAKTO*:

– 200 (2004:2): **HUMURO**.

– 201 (2004:3): **DISKRIMINACIO** – rasa, seksa, religia kaj aliaj formoj de diskriminacio. Ĉu ekzistas diskriminacio en via lando? Sciigu tion al la mondo! Limdato: la 1a de majo.

– 202 (2004:4): **LUDOJ** (historio de diversaj ludoj, ekzemple, ŝakoj; modernaj ludoj, interkulturaj ludoj). Limdato: la 5a de junio.

– 203 (2004:5): **RIFUĜINTOJ/HOMAJ RAJTOJ/TOTALISMO/DIKTATORECOJ**. Limdato: la 1a de aŭgusto.

– 204 (2004:6): **TERORO/TERORISMO** (inkluzive de hejma teroro/perforto). Limdato: la 1a de oktobro.

Ni ankoraŭ ne planis konkrete aliajn temajn numerojn. Skribu – tiu decido povas esti ja la VIA. Inter eblaj temoj estas la jenaj: **MANGAĴOJ** (kial normalaĵoj en iuj landoj estas ŝokaj en la aliaj?); **POLITIKO** (diversaj politikaj ideoj kaj ideologioj, avantaĝoj kaj problemoj de demokratio, kapitalismo/socialismo k.s.); **MILITOJ** (historia aspekto, nuntempaj militoj); **TUTMONDIĜO**; **SEKTOJ** (kio estas "sekto"? kie estas la diferenco inter religio kaj sekto? kiel sektoj "kaptas" siajn viktimojn? ĉu malfacilas eskapi de sekto? kio ĝenerale allogas homojn en sektojn?); **TOLEREMO KAJ SOLIDARECO**. Krome, ekde tiu ĉi jaro *KONTAKTO* ekkunlaboras pri la projekto *Interkulturo* <www.interkulturo.net>. Kune kun la IK-teamo, *KONTAKTO* preparos artikolojn rilatajn al kultura diverseco, interkultura lernado, interkulturaj konfliktoj ktp. Viaj artikoloj / ideoj ĉi-temaj kaj ajnatemaj estas pli ol bonvenaj!

* Notu: se vi interesiĝas pri la temo, kies limdato jam pasis, sendu vian artikolon ĉiuokaze – ĝi simple estos publikigita en posta numero.

Jes, sed ĉu tio estas arto?

Anna LÖWENSTEIN, Italio

Sur la planko en unu el la plej gravaj art-muzeoj de Londono kuŝas 120 brikoj. La usona artisto, Carl ANDRE, ne aranĝis ilin laŭ aparte artisma maniero, simple li metis unu sur la alian en la formo de rektangulo. Oni povus imagi, ke baldaŭ alvenos la konstruistoj por forporti ilin.

Por tiu ekspoziciaĵo la muzeo Tate pagis en 1976 altegan sumon (ĝi ne volis malkaŝi al la publiko precize kiom, sed certe temis pri miloj da **pundoj**). La populara taggazeto *Daily Mirror* havis sian opinion pri tiu elspezo. Aperis en ĝi artikolo sub granda titolo *Kia granda stultajo!* Mi ne ŝatas trovi min en konsento kun *Daily Mirror*,

CETERE

En nov-jorka Nova muzeo de moderna arto okazas ekspozicio de aparato, kiu nomiĝas **Kloako**. Belga artisto Vim Delvoje opinias, ke tiu aparato estas pura arto, ĉar ĝi donas nenun praktikan utilon. La aparato celas montri **digeston** de la homo. Dufoje tage oni "manĝigas" ĝin per bonkvalita manĝaĵo, kaj ĝi produktas... pensu mem kion ĝi produktas (bildo 4).

kies opinio pri artismaj aferoj ne estas kutime atentinda, tamen en ĉi tiu okazo mi devas sam-opinii.

Ne plaĉas al mi konfesi tion. Ĉu estas mi mem, kiu estas tro stulta por kompreni? Multaj tre famaj artaĵoj ne estis komprenataj en la propra tempo, kaj nur poste la homoj komencis ŝati ilin. Van GOGH, ekzemple, kiu nun estas unu el la plej famaj kaj amataj artistoj, dum sia tuta vivo vendis nur unu pentraĵon. La **urinujo** de la franca artisto Marcel DUCHAMP nun estas **klasikaĵo**, sed kiam li unue proponis ĝin al nov-jorka art-muzeo en 1917, ĝi ne estis akceptita. Eĉ kontraŭ la Ejfelturo venis multaj plendoj, kiam ĝi estis ĵus konstruita – poste ĝi fariĝis la plej fama vidindaĵo de Parizo, kiun ĉiuj turistoj nepre devas viziti.

Povus esti, ke post kvindek jaroj la brikoj de ANDRE fariĝos klasikaĵo, same kiel la urinujo de DUCHAMP, kaj ke oni memoros kun malestimo la homojn, kiuj estis tro malklar-vidaj por kompreni ilian artisman valoron. Jam mi rimarkas, ke mia 18-jara filo vere ĝuas tiajn artaĵojn, kiujn mi mem rigardas kun granda dubo. Kiam li vidas, ekzemple, pentraĵon tute nigran (ja ekzistas tiaj pentraĵoj), li trovas tion vere amuza.

Multaj modernaj artaĵoj vekas la demandon, kio entute estas arto. Por mi artaĵo estas pentraĵo, **skulptaĵo** aŭ simile. Sed laŭ modernaj artistoj ĝi povas esti ankaŭ malnova meblo aŭ filmo – mi celas filmojn, kiujn neniu volus spekti, krom specialistoj pri arto. (Sed ĉu artistoj produktas siajn verkojn nur por montri al aliaj fakuloj?)

Mi mem supozus, ke io, kion oni difinas "arto", devus celi la okulon, same kiel muziko celas la orelon. Laŭ la artistoj ne: laŭ ili arto povas esti ankaŭ okazaĵo. En 1995, ekzemple, la brita artisto Martin CREED kreis verkon kun la titolo *La lampoj, kiuj ŝaltiĝas kaj malŝaltiĝas*. Ĝi konsistas el precize tio: malplena ĉambro, kie la lampoj ŝaltiĝas kaj malŝaltiĝas.

Ne laŭ artisma maniero, kiel, ekzemple, la koloraj lumoj en disko-dancejo. Simple normale, kiel povus fari ĉies lampoj hejme.

Laŭ la usona artisto Richard PRINCE, artaĵo povas ankaŭ esti ŝerco. En 1985 li prenis ŝercon (ne tre bonan) el revuo. Li skribis ĝin senzorge sur malgranda papero, aldonis sian nomon, kaj vendis ĝin kontraŭ \$10. Por la dua ŝerco li ricevis iom pli. Nun li pentras la ŝercojn tre bele sur grandaj tabuloj, kiujn oni pendigas en la plej famaj art-muzeoj, kaj li ricevas por ili milojn da **dolaroj**.

Kion oni devas fari por ricevi tian sukceson? Se mi mem skribaĉus malbonan ŝercon sur poŝtkarto, neniu donus al mi eĉ \$10. Simile, se mi portus urinujon al art-muzeo kaj proponus ekspozicii ĝin, oni ridus. La artisma aspekto de tiuj kreaĵoj dependas de la situacio, en kiu oni prezentas ilin. Sed ĉu la valoro de artaĵo ne devus troviĝi en la verko mem, senkonsidere de la loko aŭ la maniero de ĝia ekspoziciado?

Kiam mi iras al muzeo kaj vidas tiajn ekspoziciaĵojn, mi sentas ĝenon. Estas la sama sento, kiun mi havas, kiam ĉiuj ridas pro ŝerco, kiun mi ne komprenas. Mi eĉ sentas iom da kolero – ĉu mi

estas tiel stulta kaj malmoderna, ke nur mi ne trovas ĝin amuza?

Pluraj verkoj, kiujn mi vidis en art-muzeoj, laŭ mia opinio estus tute taŭgaj, se ili aperus en alia formo, ekzemple kiel **afiŝo**, aŭ reklamo, aŭ kiel bildo en revuo. Tiam verŝajne ankaŭ mi ĝuus kaj longe memorus ilin. Sed kiam ili aperas sur la muroj de muzeo, ili ricevas gravecon kaj ŝajnan signifon, kiun ili ne meritas.

Kelkfoje per tiaj verkoj la artistoj deziras pensigi la rigardantojn pri la celo de la arto mem. Kaj tio funkcias; kiam oni rigardas artaĵon kun la titolo *Folio de papero A4 kunpremita por formi pilketon*, aŭ alian, kiu konsistas nur el tute ordinara lampo fiksita al muro, oni ja demandas sin pri la celo de arto, ĉu ne? Aliflanke, ĉu la celo de arto estas nur diskutigi pri la celo de arto? Tio estas kiel uzi Esperanton nur por paroli pri Esperanto.

En la muzeoj de la mondo troviĝas art-verkoj el antaŭaj jarcentoj, eĉ el tre malproksimaj tempoj, kiujn oni ankoraŭ nun rigardas kun granda plezuro. Sed se la **arĥeologoj** de la estonteco elfosus la muzeon Tate kaj trovus la brikojn de Carl ANDRE, kion ili pensus? Verŝajne ili eĉ ne komprenus, ke temas pri artaĵo: ili supozus, ke la brikoj estis ordinara konstru-materialoj sen artisma celo. Kaj kiam temas pri la lampoj kiuj ŝaltiĝas kaj malŝaltiĝas, de tiu verko ili tute ne trovus restaĵon.

afiŝo – granda presita anonco, fiksebla al muro, ofte kun bildo(j)

arĥeologo – sciencisto, kiu studas pasintajn kulturojn per iliaj restaĵoj en la tero

briko – unu el la eroj, el kiuj oni konstruas muron aŭ domon

digesto – korpa prilaboro de manĝaĵo

klasikaĵo – tre fama verko, kiun ĉiuj konas kaj eventuale imitas

kloako – malpurajejo

lampo – vitra ujo, kiu lumigas ĉambrom aŭ alian ejon

pundo (dolaro) – mono uzata en Britio (Usono)

rektangulo – formo preskaŭ kvadrata, tamen pli longa en unu direkto ol la alia

skulpti (skulptaĵo) – krei art-verkon el ŝtono, metalo, ligno aŭ simila materialo

ŝalti – ekfunkciigi elektran ilon aŭ maŝinon


titolo – nomo de libro, artikolo, art-verko ktp.

turo – konstruaĵo tre alta sed ne tre larĝa

urino (urinujo) – maltrinki



INTERRETO



Dum la lastaj tri jardekoj, post establiĝo de islama respubliko en Irano kaj sperto de talibana regado en Afganio, ofte aŭdeblas la demando: kial laŭ islamo oni ne rajtas pentri / skulpti / foti homojn? Ĉu vere nome islamo malpermesas enbildigon de homa korpo, aŭ eble tio estas genta kutimo de la mez-orientanoj?

Unue ni notu, ke islamo ne ĉie estas same komprenata kaj praktikata. Ĝi ne estas homogena unuo. Ekzemple, la islamo en Mez-Oriento estas malsama al la islamo en Sud-Oriento (ekzemple, Malajzio). Krome, eĉ en unu lando troveblas diferencoj. Ekzemple, en Suda Irano virinoj kovras, krom la kapojn kaj korp-ojn, ankaŭ siajn vizaĝojn, dum en centraj kaj nordaj partoj de la lando ili kovras nur la korpon kaj hararon.

Oni devas ankaŭ noti, ke islamaj leĝoj eltiriĝas ĉefe el Korano kaj elparoloj de la profeto (Hadis). Do, por unusola elparolo aŭ iu verso de Korano ekzistas diversaj kaj iam malsamaj interpretoj. Ekzistas interpretoj relative toleremaj kaj interpretoj tre striktaj. Tiu talibana interpreto de islamo, kiu rezultigis eksplodigon de du grandaj statuoj de Budho aŭ malpermesis fotadon de homa vizaĝo, estas konsiderata ekstrema. Kaj ĝi ne estas konduto de nur talibanoj: ni povas konstati ĉi tiajn tendencojn ĉie en islamaj landoj...

Antaŭ islamo en Irano oni ja povis pentri aŭ skulpti homojn kaj bestojn. Ekzemple en Persepolo oni trovas gravuritan sur muroj vicon de soldatoj kaj imagitajn bestojn, skulptitajn kiel kapituloj.

Post islamo, tamen, pentrado kaj skulptado en la lando malprosperis. Neislamanoj, aparte okcidentanoj, malfacile trovas pravigojn por tio, sed ili forgesas, ke en la profundo ĝi havas samajn radikojn, kiuj nutras parton de ilia propra kulturo kaj civilizacio (rememoru la biblian epizodon, kiam Moseo rompis oran bovidon!). Ankaŭ teatro, kiu en la helena epoko prosperis, post kresko de kristanis-

Ikonrompisto kaj nuntempaj, aŭ:

Kiam religio estas kontraŭ arto...



mo en la mezepoko estis neglektata. Hodiaŭ, kiam oni uzas la vorton "ikonrompisto", oni volas paroli pri iu, kiu vaste atakas kredojn, akceptatajn en la socio. Tamen originale ĝi signifis iun, kiu senmetafore rompas idolojn. La unua ikonrompisto sendube estis Moseo.

La tri abrahamaj religioj (judismo, kristanismo kaj islamo) estas similaj almenaŭ rilate severan malpermeson de idol-adorado. Kaj por pli efike forigi la riskon, ĉiuj ili kelkfoje en historio agadis kontraŭ bildoj kaj figuroj. La unuaj kristanoj detruis figurojn de grekaj kaj romiaj dioj ĉie en Romo, kaj la samon kristanaj misiistoj faris ĉie en la mondo. La Protestanta Reformacio de Lutero kaj Kalvino parte estis reago kontraŭ la katolika kulto de Maria kaj sanktuloj. Protestantoj detruis multajn katolikajn ikonojn. Ankaŭ en judismo ikonrompemo forte ĉeestas.

Oni argumentas, ke monoteismaj religioj forte forpuŝis bildojn kaj figurojn. La religiuloj simple timis, ke oni adoras tiujn figurojn kaj bildojn anstataŭ Dion. Laŭ ili, Dio estas pura spirito – io nefigurable kaj nebildigebla. Aliflanke ili kredis, ke realeco, kreita de Dio, estas bela, sed ĝi ne meritas konsideron, ĉar kompare al Dio ĝi estas efemera.

Estas interese scii, ke frua islamo ne malpermesis pentradon kaj skulptadon. Ĉi tiu situacio ŝanĝiĝis, kiam judoj konvertiĝis al islamo kaj ekhavis influon en la reganta sistemo. Post ilia konvertiĝo (ĉirkaŭ 700 p.K.) Abd-al-Malik liveris dekreton, laŭ kiu kristanoj, kiuj loĝis en islama imperio, ne rajtis ornami siajn preĝejojn per ikonoj kaj aliaj simboloj. Tiun dekreton plifortigis Jazid II en 721 p.K. (ekde tiam ĝi aplikiĝis ankaŭ al islamanoj). Post tiu dato detruo de bildoj kaj figuraj artaĵoj senĉese daŭris...

La kopta egipto Ibn-al-Mugafa skribis, ke ekde 686 ĝis 689 p.K. ĉiuj krucoj, eĉ oraj kaj arĝentaj, en tiu lando estis detruitaj. Sur la pordoj de preĝejoj estis skribite: "Mahometo estas granda apostolo de Dio. Ankaŭ Jesuo estas apostolo de Dio. Sed la vera Dio ne estas naskita kaj ne naskas". En 719 kaj 720 p.k. preskaŭ ĉiuj mozaikoj en preĝejoj de Palestino kaj Transjordanio estis frakasitaj. En 705 kaj denove en 713 kaj 714, sub regado de Jazid II, krucoj kaj bildoj estis detruitaj. Ĉu konvertitaj eksjudoj aŭ timo de idol-adorado puŝis islamanojn al tia agado kontraŭ figuraj artaĵoj? Oni opinias ke, kiam islamaj araboj konkeris Bizancon, vidante belecon de ties

skulptaĵoj, ili sentis sin malsuperaj kompare al iliaj kreantoj. Oni sugestas ke nome pro tio ili detruis la artaĵojn...

Mi mem ŝatas proponi alian hipotezon ĉi-rilate. La origino de tia konduto radikas multe antaŭ la apero de monoteismo. Ĝin oni serĉu en la kredaro de niaj praavoj. Ĉiuj ni ja spektis filmojn, en kiuj malica sorĉistino turmentas iun, manipulante (plejofte pingle pikante) pupon? Aŭ tiujn, en kiuj iu eliĝas el pentraĵo?.. Mi opinias, ke ĉiuj tiaj superstiĉoj devenas de la kredo, laŭ kiu oni povas transmeti kaj enkapti animojn de homoj en objektojn. Tiu hipotezo ankaŭ klarigas, kial en iuj landoj pentri, skulpti aŭ foti homojn aŭ bestojn estas malpermesite.

Malgraŭ ke islamanoj ne povis pentri aŭ alimaniere enbildigi vivaĵojn, tamen ili disvolvis aliajn formojn de arta esprimo: geometrian arton, abstraktajn simbolojn kaj kaligrafion. En iuj partoj de la islama mondo oni tamen ne tiel multe sekvis striktajn interpretojn. Ekzemple, en Irano oni povas pentri ĉiujn ajn, krom la profeto kaj sanktuloj, sed por forigi ĉian suspekton pri idol-adorado iuj elektis du-dimensian prezentadon.

* kapitulo – supro de kolonoj

La urbo de via revo

ANONCE



KOMPLEZE DE LA AUTORO

Facila

Sergej TIMČENKO, Ukrainio

En la jaro 2001 la *Papo* vizitis Ukrainion. Dum lia restado en Kievo mia lernantino Anja VARRAVA sendis al li lignan anĝelon, kiun ŝi mem ĉize skulptis. Responde venis dankletero de la *Papo*...

“Ĉu vi volas esti liberaj? Liberaj de aŭ liberaj por? Ĉu vi scias, kio estas libereco? Bone, mi rakontu. Ĝi estas ebleco realigi viajn plej kuraĝajn ideojn. Ekzemple, vi ek-volis loĝi en vilaĝo – vi aĉetis al vi vilaĝon. Vi ekvolis loĝi en urbo – vi konstruis urbon. Aleksandro la Granda, Petro la Unua, Walt DISNEY faris tion. Tamen la urbo de la unua estis la rezulto de multnombraj militoj; la urbo de la dua kostis vivojn de multaj sklavoj, kaj nur la urbo de la lasta estas verko de talento desegnista mult-obl-ig-ita per

g e n i o
financista.

Ĉu vere vi ne



Alegro en nokta ĉapeto.
S. TIMČENKO

volus konstrui la urbon de via revo? Urbo, en kiu ne estas loko por tiuj, kiuj ne plaĉas al vi, kie ne ekzistas malsanoj kaj ne estas tio, kion vi ne deziras?..

Nu bone, ni **supozu**, ke vi jam konstruis la urbon de via revo. Ni nomu

ĝin Rev-urbo. Kaj certe Rev-urbo estos la plej bela kaj bona urbo en la mondo. Ondo de varma maro karesas la **bordojn**; tutan jaron tie floras la plej belaj floroj; de sur neĝa monto oni ĉiam povas gaje malsupren-skii. Super la Rev-urbo ĉiu-tage brilas suno, kaj se ek-pluvas, tio malhelpas al neniu. Kaj certe en tiu urbo vivos interesaj kaj bon-koraj homoj.

La fenestroj de via domo rigardas al la Ĉef-Placo. Kontraŭ via domo estas **Templo** de Via Kredo kaj **Viv-Principoj**. Dekstre de via domo, apud la Templo, staras **Muzeo** de Viaj Kulturaj Valorajoj... Nur unu loko en la centro de la Ĉef-Placo estas mal-plena, kaj vi devas pli-bel-igi ĝin per *via* Kreaĵo. Ĝi devas speguli Vian Kredon, Viv-Principojn kaj Kulturajn Valorajojn. Tion vi volas montri al la loĝantoj kaj gastoj de Rev-urbo, kaj ili devas neniam **ekenui** rigardante vian verkon. Kaj nun, kiam vi scias pri Rev-urbo, kreu ĝin tiel, ke viaj kreaĵoj estu indaj por via Rev-urbo!”

Per tiu ĉi rakonto mi komencas instrui al gejunuloj **skulptadon** kaj artan ligno-ĉizadon. Poste ili lernos realigi siajn pensojn en formoj, pentri, pri-labor-adi multajn materialojn. En iliaj manoj akraj iloj fariĝos **obeemaj**. Ilin atendas multe da laboro, studado kaj... sukceso!

Ili ĉiam inter-ŝanĝas ideojn. Nia celo estas ne **imiti**, sed kreadi. Kiam ni vidas bonajn skulptaĵojn, ni ĝojas, kaj ne gravas, kiu estis la aŭtoro. Dank’ al verkoj de aliaj ni ekscias pli pri ni mem kaj pri la mondo.



Ombro de sono. S. TIMČENKO

Jam ok jarojn mi okupiĝas pri mia plej ŝatata afero kaj instruas ĝin al gejunuloj. Nun mi lernas Esperanton kaj volas traduki mian kurson en Esperanton. Ni tre ĝojos konatiĝi kun aliaj esperantistoj, kiuj interesiĝas pri skulptado kaj ĉizado!

anĝelo – spirita estaĵo, meza inter Dio kaj homo (ofte montrata en arto kun flugiloj)

bordo – tero tuj apud maro, rivero, k.s.

ĉizi – pri-labori **lignon** (ŝtonon ktp.) per akra ilo

enui – mal-interesiĝi

financisto – tiu, kiu okupiĝas pri mono

genio – grandega talento

imiti – fari simile

karesi – ame tuŝeti

kuraĝa – sen-tima

ligno – materialo el arbo

muzeo – kolekto kaj konservejo de valorajoj

obei (obeema) – sekvi la dirojn aŭ ordonojn de aliaj

Papo – la plej supera (sur-tera) gvidanto de Rom-Katolikismo

placo – malferma loko en la centro de urbo

principo – regulo

revo – tio, pri kio ni pensadas kaj volas real-igi

skiado (skii) – vintra sporto

sklavo – mal-libera laboranto

skulpti (skulptaĵo) – unu el ĉefaj artoj; skulptaĵoj ĉiam estas tuŝeblaj

supozi – pensi, opinii

talento – kapablo; sen talento tre malfacilas **skulpti** aŭ desegni

templo – religia konstruaĵo

<Kontaktu>

<sergey_tim@ukr.net>, UA-02125, Kiev-125, bulv. Perova 16-b, apt. 15, Ukrainio.

Saluton! Mi serĉas korespondamikojn, kiuj interesiĝas pri sporto kaj aviado (mi estas 18-jaraĝa lernanto). Skribu al: <cxhx@pochta.ru>; Igor Cigno, Pochtamt, P.O box 27, Mirgorod, Poltavskaja oblastj, Ukrainio 37600.

Por ĉiuj esperantistoj en kaj ekster SAT!

Antaŭnelonge ekfunkciis dissendolisto kaj informejo de la IN-fako “EMMA” ĉe SAT – *SATINO*. *SATINO* kunlaboras kun ĉiuj esperantistoj kaj esperantistoj, kiuj volas speciale engaĝiĝi por la rajtoj de inoj en ĉiuj sferoj de la socio. *SATINO* estas kontraŭ ĉia diskriminacio kontraŭ inoj, ankaŭ en Esperantujo. *SATINO* helpas rompi tabuojn kaj antaŭjuĝojn pri inoj. *SATINO* estas kreita unuavice pro neceso politika, sed tamen ĝi estas malferma por ĉiuj tipe inaj aferoj. *SATINO* estas bazo por pli bone povi diskuti, kiel inoj devas agadi en la E-organizoj kaj en la In-movadoj. Pli da informoj: <http://groups.yahoo.com/group/satino>. Aliĝu: <satino-subscribe@yahoo.com>, aŭ sendu mesaĝojn al: <satino@yahoo.com>. Administrantino de la dissendolisto *SATINO* – Dorothea KAISER: <satino-owner@yahoo.com>, <kaiser-altenburg@t-online.de>; Germanio, 04600 Altenburg, Wenzelstr. 12.

Esperanto en la uragano de ideologioj. Internacia Esperanto-Simpozio en la Aŭstria Nacia Biblioteko

La 8an kaj 9an de oktobro 2004 la Aŭstria Nacia Biblioteko, kunlabore kun UEA, organizos simpozion okaze de du Esperanto-jubileoj: la centjara datreveno de la naskiĝo de Lidia ZAMENHOF (1904-1942) kaj la 75-jariĝo de la Internacia Esperanto-Muzeo (IEM, aligita al la Aŭstria Nacia Biblioteko en 1929). Prelegos Ulrich LINS (Germanio/Japanio, ĉefpreleganto), Vilmos BENCZIK (Hungario), Wera kaj Detlev BLANKE (Germanio), Heiner EICHNER (universitato de Vieno, Aŭstrio), Alex KAEFER (Aŭstrio), Herbert MAYER (IEM, Aŭstrio), Claude PIRON (Svisio).

La historio de Esperanto kaj la sorto de esperantistoj estas firme ligita al la ĝenerala historia evoluo. Verki historion de Esperanto signifas verki kadre de la historio de la mondo. Tion montris Ulrich LINS per *La danĝera lingvo. Studo pri la persekutoj kontraŭ Esperanto*. Esperanto do ne estas io ekzotika kaj margena, kiel foje opinias la ĝenerala publiko, sed ĝi estas integra parto de historiaj evoluoj.

Tiu fakto estas la elirpunkto de la simpozio, kiu pritraktas la destinon de Esperanto en la politikaj-ideologiaj uraganoj de la pasinta jarcento, fokusante interalie la atenton al la sorto de Lidia ZAMENHOF (murdita en la koncentrejo Treblinka en 1942) kaj de la Internacia Esperanto-Muzeo (fermita en 1938 fare de la nazioj). Apud tio estos pritraktataj ankaŭ temoj, kiuj tuŝas la nuntempon: kia estas hodiaŭ la situacio de Esperanto en la mondo? Kiel aspektas la rilato inter Esperanto kaj la nunaj politikaj regantoj? Kiel kondutu la esperantistoj en la mondo, kiu almenaŭ en la publika diskurso ege malfavoras la ideon de artefarita internacia helplingvo, sed aliflanke pere de modernaj teknologioj ofertas novajn eblecojn?

La laborlingvo dum la unua duontago de la simpozio estos la germana por la ne-Esperanta publiko – la cetero disvolviĝos en Esperanto. Paralele okazos: malfermo de ekspozicio pri la sama temo en la Internacia Esperanto-Muzeo, prezento de la novel-donita plena verkaro de Lidia ZAMENHOF kaj internacia Cseh-kurso por tutkomencantoj. (La germana nomo de la aranĝo estas: Die gefährliche Sprache). Partoprenkotizo: 50 EUR, por studentoj kaj lernantoj 35 EUR. Aliĝo: <plansprachen@onb.ac.at>.

FREŜO ‘04 – Frusomera Renkontiĝo Esperanta Ŝokanta Obstinulojn. E-kviza okazaĵo kun premioj. 30 de junio – 04an de julio en Olsztyn (Pollando). Aliĝado: Marian ZDANKOWSKI, ul. Limanowskiego 4, 10-343-Osztyń, Pollando. Rete: <avolamer@ols.vec-tranet.pl> kaj <angiel@polbox.com>. Programo: krom kvizoj – prelegoj, ekskursoj ktp. <http://www.ema.z.pl/esperanto>. Pri FREŜO emfazis: “...neforgesibla aranĝo...” – *El Popola Ĉinio*. “...eble la plej fama kviza programo en Esperantujo...” *La Ondo de Esperanto*.

10-17 de julio: 60-a IJK, Internacia Junulara Kongreso en ripozejo Berjozka apud Kovrov (regiono Vladimir), Rusio. Inf: LKK de IJK, Slavik Ivanov. Rete: slavik@babel.komputilo.org; http://www.tejo.org/ijk; http://www.tejo.org/rejm/ijk/index.php (pli detale – en TEJO Tutmonde).

Lando dezirata

Antaŭnelonge la uzbekia urbo Samarkando estis listigita en la Listo de Kultura



Panvendisto en samarkanda bazaro

Anatoli IONESOV, Uzbekio

Inter la multnombraj urboj de la mondo malmultas tiuj, kiuj portas specialan signifon kaj kaŝas en si plurajn enigmojn de torentaj interplektiĝoj de la historio. Temas pri tio, ke multajn problemojn, kiujn alfrontas nun la homaro, eblas solvi nur bone konante la historion. Samarkando estas kondukilo de ideoj, kiuj eliris tre malproksimen de la limoj de Centra Azio. Kio do tiel ekskluzivigas Samarkandon?

Ekde ŝtona epoko ĝis Aleksandro la Granda

La historio de la urbo radikas en la ŝtona epoko. En la ĉirkaŭaĵoj de Samarkando troviĝas unikaj kavernaj loĝlokoj de neandertalaj prahomoj, kiuj aĝas je almenaŭ 40 000-100 000 jaroj. Pli poste la vivo translokiĝis al la teritorio en la centro de la nuntempa Samarkando. Tie cetere ĝis nun ekzistas la akvofonto, kiu vivnutris plurajn generaciojn de homoj dum multaj jarmiloj. Povas esti, ke ĝuste dank' al tiu ĉi akvofonto Samarkando transformiĝis al granda urbo... En la loko, kie troviĝas la nuna urbocentro, situis loĝloko de prahomo de la malfrua paleolitiko (antaŭ 20 000-40 000 jaroj), kie estis malkovritaj surteraj loĝejoj, ornamaĵoj, laboriloj ktp.

Nova paĝo en la historio de Samarkando komenciĝis ekde la 7-6a jarcentoj a. K., kiam ĝi supozeble fariĝis vera urbo. Tiam aperis ankaŭ ĉiuj trajtoj de la urba vivo: citadelo, defendaj muroj, metiistaj kvartaloj, templo, palaco k.s.

Cetere

Ekzistas multaj legendoj kaj hipotezoj pri la deveno de la nomo "Samarkand". Iuj diras, ke la urbo ricevis sian nomon laŭ la nomoj de ties konstruintoj – Samar kaj Kamar. Laŭ aliaj versioj, la nomo tradukiĝas kiel "la urbo de dolĉaj fruktoj", "lando dezirata de la koro" aŭ "riĉa loĝloko". Tamen nunaj fakuloj opinias, ke la vorto "Samarkand" en la antikva persa lingvo

supozeble signifis "kunveni", "renkontiĝo", "kunveno" kaj en la sanskrita – "loko por renkontiĝoj kaj kunvenoj" kaj "loko por komerco". Ĝuste evoluo de komerco stimulis formiĝon de la urba vivo.

La sekva paĝo en la historio de Samarkando, kiu en la helenaj manuskriptoj nomiĝis "Marakanda", estas ligita al la epoko de konkeraj militoj de Aleksandro la Granda (la 4-3a jarcentoj a. K.). Por li Samarkando iĝis malfacile superebla baro survoje al Ĉinio kaj Hindio. Aleksandro la Granda diris: "Ĉio, kion mi aŭdis pri la belajoj de Samarkando, estas pura vero, krom tio, ke ĝi estas pli bela ol mi imagis".

Cetere

Surbaze de studado de tekstoj el "Avesto" kaj aliaj fontoj ekzistas sciencaj supozoj, ke la fondinto de la unua monda religio – zoroastrismo – Zoroastro (perse "Zaratuŝtra") naskiĝis ĉe la bordo de la rivero Dargom, t.e. en la ĉirkaŭaĵoj de Samarkando, ĉe la limo inter la dua kaj la unua jarmiloj a. K. Sed poste li komencis prediki la novan religion en la sudo de la nuna Uzbekio – en Baktrio.

Elementoj de zoroastrismo ĝis nun konserviĝis en la tradicia kulturo de mez-aziaj popoloj. Ekzemple, dum geedziĝo okazas marŝado kun fajrotorĉo tra vilaĝo, gefianĉoj supersaltas lignofajron "purigante" sin (kiel konate, en zoroastrismo estas kvar sanktaj

Sogdiana estis la lando inter la riveroj Amudarjo (antaŭe Oks) kaj Sirdarjo (antaŭe Jaksart). Romianoj nomis ĝin "Transoksiana" ("trans la rivero Oks"), araboj – "Mavarannahr" ("inter du riveroj"). Ĝi estis unu el la plej antikvaj landoj de amasa artefarita akvumado, kiu transformis sekajn grundojn de la regiono en florantajn oazojn. Tion pruvas eltrovaĵoj de arkeologoj, kiuj trovis ĉi tie multkilometrajn 2500-jaraĝajn irigaciajn kanalojn. Ĉefurbo de Sogdiana estis Samarkando.

Post la konkero fare de Aleksandro la Granda komenciĝis periodo de aktiva kultura kuniĝo de helenaj kaj centr-aziaj tradicioj. Plej bone tiu ĉi sintezo videblas en la suda parto de Uzbekio, kie ni eĉ nun povas vidi budhistajn heroojn en la aspekto de helenaj dioj... Ankaŭ poste Samarkando daŭre restis dezirata celo. Dum la epoko de la granda translokiĝo de popoloj (la 1-6a jarcentoj p. K.) Samarkando estis en la centro de atento de konkerantoj*.

elementoj: fajro, aero, tero kaj akvo). "Nauruz" – orienta nova jaro, festo de printempo – ĝis nun estas unu el la plej popularaj festoj en Centra Azio.

Oni opinias, ke budhismo, naskiĝinta en Hindio je la limo inter la kvina kaj la kvara jarcentoj a. K., enpenetris Ĉinion kaj poste Japanion kaj Koreion tra Okcidenta Hindio kaj Kuŝana regno***, sur kies teritorio tiam situis ankaŭ Samarkando. Fakte zoroastrismo kaj budhismo paralele kunekzistis ĉi tie ĝis la oka jarcento.



Lernejo Tilla Kari

de la koro

Heredaĵo de la Homaro de Unesko

Araba konkero kaj la islama Renesanco

La sekva etapo en la historio de la urbo estas ligita al la araba konkero kaj al la historio de la Araba kalifejo. En la jaro 712 Samarkando estis konkerita de araboj. Ekde tiu ĉi tempo komenciĝas evoluo de Samarkando en la sino de araba kulturo. Ĝi fariĝas centro de la spirita vivo de centraziaj popoloj. La urbo kreskas, aperas monumentaj konstruaĵoj en tradicioj de islama arkitekturo. Samarkando tre brile montris sin dum la epoko de la t. n. islama Renesanco (fino de la 9a ĝis la 11a j.c.). Historio de la urbo estas ligita al la nomoj de la tieaj eminentuloj: Rudaki, Omar Hajam, Beruni, Aviceno, Farabi, Al-Horezmi k.a., kiuj faris grandegan kontribuon al la evoluo de la monda scienco, inkluzive medicinon, astronomion, literaturon, matematikon ktp.

Cetere

Eble ne ĉiuj scias, ke la fondinto de algebro – genia scienculo Abu Abdallah Muhammad ibn Musa Al-Horezmi (ĉ. 800-847) – naskiĝis en Ĥivo, proksime de Samarkando. Li estis eminenta matematikisto, astronomo kaj geografo. Liaj antaŭuloj estis pastroj de zoroastra religio, tiam reganta en Horezmo. Unuiginte ĉiujn atingojn de la antaŭaj matematikistoj, li verkis la traktajon sub la titolo “La Konciza Libro pri Kalkulado per Kompletigo kaj Ekvilibro” (arabe “Kitab muhtasar al-ĝabr va l-mukabala”), en kiu li formulis ĝeneralajn regulojn, kiuj formis la unuecan scienca teorion. Al-Horezmi kreis sian teorion en Bagdado, tiama ĉefurbo de la Araba kalifejo. Dum kelkaj jarcentoj “Algebro” de Al-Horezmi estis vaste konata en la originalo, kaj poste danke al la tradukoj kaj adaptaj ĝi fariĝis eĉ pli populara. Al-Horezmi enkondukis ankaŭ hindajn / arabajn ciferojn samkiel la vortojn “algebro” kaj “algoritmo” al Eŭropo en la 12a jarcento.



Doi Hirokaz

La islama Renesanco je kelkaj jarcentoj antaŭis la okcident-eŭropan Renesanco (la 14-16a j.c.) kaj ludis gravan rolon en ĝi. La oriento sukcesis konservi la verkojn de hele-naj scienculoj, kiuj dank’ al araba traduko revenis al Eŭropo. Ja dum la Mezepoko gravega socia rolo de la Eklezio kaŭzis signifan perdon de kulturaj ligoj al la granda antikva heredaĵo. Ĉio, kio estis antaŭ kristanismo, estis neniigata, kaj pro tio multo estis por ĉiam perdita. Kaj ĝuste Centra Azio, dank’ al la krea agado de siaj scienculoj, sukcesis konservi por Eŭropo kaj por la tuta mondo multajn gravajn de la granda antikva kulturo. La antikva heredaĵo poste revenis al Eŭropo en prilaborita kaj riĉigita formo. Sed plej gravas, ke rezulte de alproprigo de la antikva heredaĵo estis faritaj novaj malkovroj (movado de steloj kaj planedoj, ekvacioj, medicino ktp).

“Sed kio diferencigas la Orientan Renesanco disde la Okcidenta?” – vi povas demandi. Kontraste al la Okcidenta, la Orienta Renesanco direktis ĉefan atenton al renaskiĝo de natur-sciencaj scioj kaj filozofio. Ĝi pli multe atentis sciencan kaj liter-

aturon ol la socian sferon kaj evoluon de individuaj liberecoj, ĉar la kolektivo ĉi tie estis kaj ĝis nun estas la plej grava valoro.

Sed tio ne signifas, ke la temoj de individuaj sentoj kaj liberecoj malforte esprimiĝis en la Orienta Renesanco. Ili simple estis reprezentitaj metafore kaj alegorie, kun bunta arta ornamo. Ni rigardu la verkojn de Omar Hajam (ĉ. 1048-1125): temoj de amo, beleco, justeco, senta inklino en lia poezio estas brile esprimitaj en la riĉa paletro de artaj figuroj.

Ruiniĝo kaj la “dua Renesanco”

En 1220 Samarkando estis konkerita de Ĝingis-ĥano. La urbo estis bruligita kaj preskaŭ plene detruita, kaj la evoluo de la urba vivo estis bremsita je pli ol 150 jaroj... En 1370 al la potenco venas Amir Timur, kiu dum sia 35-jara regado montris sin ne nur elstara ŝtata aganto, talenta militestro kaj saĝa diplomato. Li ankaŭ transformis Samarkandon en “Ĉefurbon de ĉefurboj”. Por substreki la superecon de sia ĉefurbo, Timur donis al la ĉirkaŭaj loĝlokoj la nomojn de monde konataj urboj: Bagdado, Ŝirazo, Parizo, Misro (Kairo) k.a. Kelkaj el tiuj nomoj cetere konserviĝis ĝis nun. Sur pordego de unu palaco de Timur estis skribite: “Se vi dubas pri nia majesteco, rigardu niajn konstruaĵojn”.

Alligiĝo de Samarkando al la mondo de islama kulturo ebligis fortigi la ligojn kun Okcidenta Azio kaj tra ĝi – kun Eŭropo (ĝis la marbordoj de Hispanio) kaj Afriko. Komencis vige evolui scienco, literaturo kaj arto, kaj ĉio ĉi esprimiĝis en disfloro de arkitekturo. (Ja se evoluas scienco, bezonatas lernejoj, kiuj devas esti adekvate ornamitaj.) Evoluo de scienco do stimulis evoluon de arkitekturo, evoluo de arkitekturo – evoluon de arto. Centrazia arto dum la Mezepoko klare distingiĝis per riĉa dekoracio – ĉiuj konstruaĵoj estis kovritaj per brilaj ornamaĵoj. Kial?

Unuflanke, islama kulturo malpermesis figuri homojn kaj bestojn (“oni ne rajtas fig-



Lernejo de Ulugbek



Moskeo Tilla Kari

uri tion, kio estis kreita de Dio!”). Sed ne nur figuri oni ne rajtis – eĉ en ĉiutaga vivo oni ne povis kaj ofte ĝis nun ne povas publike montri nudajn korpomembrojn: korpo, sentoj ktp. estis ĉiel maskataj kaj ŝirmataj. Samtempe ankaŭ la konstruaĵoj, kreitaj de homoj, ne povas esti nudaj, precipe se ili estas sanktaj objektoj. Tial oni “vestis” ilin en ornamaĵojn kaj kovris kvazaŭ per mozaika “tatu”. Vi ne trovos similan eksteran ornam-manieron en la Okcidento. Ne troveblas ĝi ankaŭ en aliaj landoj de la Oriento, ekzemple, en Japanio, kie, laŭ mi, la arta arkitektura tradicio trovis sian plej superan esprimon en kreado de perfektaj formoj.

En 1501 sur la samarkandan tronon venas Ŝejbani-ĥano, fondinto de la uzbeka dinastio, kiu ordigis la ŝtatajn aferojn kaj revivigis la ekonomion de la lando (mona reformo, riparo de pontoj kaj vojoj, komerco, akvumado k.a.). Tamen post lia pereco, post ekonomia kaj politika progreso, komenciĝis interfeŭdaj militoj kaj bataloj por la trono. La dinastio de Ŝejbanidoj regis la landon ĝis la fino de la 16a j.c. Komence de la 17a j.c. la potenco transiris al la dinastio de Aŝtarĥanidoj kaj poste al tiu de Mangitoj. La finon de la 17a j.c. kaj la unuan duonon de la 18a j.c. oni nomas la tempo de tumultoj. Senfinaj militoj kondukis al formiĝo de feŭdaj monarĥioj – la Kokanda kaj Ĥiva ĥanlandoj kaj la Buĥara emirlando surteritorie de la nuntempa Uzbekio en 16-19aj j.c. Post konkero de Mez-Azio fare de Rusio en 1868 Samarkando iĝis administra centro de Zarafšana distrikto, kaj ekde 1887 – de Samarkanda provinco. Ekde tiu tempo en la urbo oni komencas konstrui vastajn stratojn, eŭropstilajn domojn, industriajn entreprenojn...

Cetere

La unua blazono de Samarkando estis kreita dum regado de Amir Timur. Ekde 1994 estas oficiale uzata nova blazono de la urbo, kreita de la loka pentristo Grigorij Ulko. La bazon de la blazono formas ruĝa rondo – batala ŝildo, simbolo de defendo de Samarkando. Ruĝa koloro signifas vivon, dinamikon, evoluon. Centre estas flugilhava neĝa leopardo en pozo de beno. Bestoj kun flugiloj estas antikvaj simboloj de altspirita rilato al ili. Similaj simboloj aperis en pasinteco kiel simboloj de unueco de naturo kaj homo. Malsupre estas or-blanka ondeca linio, simbolanta la riveron, kiu portas oron –

Zarafšan. En supra parto de la blazono lokigas sep-pinta turkis-kolora stelo – signo, ege respektata en la Oriento, – simbolo de perfekteco, de unueco de scienco, arto kaj arkitekturo, kiu ege harmonias kun la pasinteco, nuntempo kaj estonteco de la urbo.

Aliaj “Samarkandoj”

Nuntempe Samarkando estas la dua plej granda industria, kultura kaj scienca centro de Uzbekio, kaj kiel magneto ĝi daŭre allogas vizitantojn el la tuta mondo. Interalie, en multaj landoj troveblas diversaj lokoj kaj objektoj kun la nomo de nia urbo. Ekzemple, en la usona urbo Santa Barbara estas kvartalo, strato kaj centro por pliaĝuloj nomataj *Samarkand*, en Aŭstralio – hotelo, en Francio – firmao kaj samtitolaj kolonia akvo kaj parfumo. En Italio oni bone konas la kanzonon *Samarkand* kaj en skandinavaj landoj – la kanton *Se iam venos vi al Samarkand*, teatro *Samarkand* estas en Hispanio, poemo *Ora vojaĝo al Samarkand* eniris la antologion de la angla poezio. Vendejoj *Samarkand* troviĝas en Kopenhago, Fukuoka, Thiene...

fotoj de la aŭtoro

* Rezulte de tiuj konkeroj ĝi eniris la grandajn imperiojn de la Oriento: la ŝtaton Kangjuj (la 1-3a j.c.), la ŝtaton de Eftalitoj (la 4-5a j.c.) kaj Tjurkan princlandon (la 5-6a j.c.).

** Avesto – en zoroastrismo – kolekto de sanktaj libroj. Avesto ekestis, verŝajne, en la unua duono de la unua jarmilo a. K. kaj enhavas aron da religiaj kaj juraj instrukcioj, preĝkantoj, himnoj ktp.

*** Kušana regno – unu el la kvar grandaj imperioj de la antikva mondo (kune kun la Romia imperio, Parfjana regno en Irano kaj la ĥana Ĉinio).



Fripuljo

Sergej TIMĈENKO, Ukrainio

Bildo la unua. Lastaj ferioj de majo. Tago de la urbo. Liberaera art-ekspozicio en kieva Monmartre** – deklivo Andrejevskij. Aro da ferie vestitaj homoj malrapide fluas laŭ la sinundita kurba strato, serpente iranta suben de sur la monteto. En unu loko la homfluo subite haltas. Ĉies atento estas aldirita al io eksterordinara. Ne kaŝante sian scivolemon, oni rigardas, kiel unu homo en freneze stranga kostumo (brila pompa kasko, kombineo, malhela, ĝis-pieda mantelo kun longa brila trenajo) konstruas ion

Fripulismo*: bizareco, huliganeco aŭ arto?

tute strangan. Observema okulo povas kapti tie segbokon***, duonsferajn fenestrojn de helikoptero, tirkestojn de skribotablo, ombrelon, kontrabason, hamakon, valizon, manekeno kaj pурсangan ŝafhundon en koljungo kun grandegaj falsaj diamantoj. “Kosmoŝipejo de Fripuljo”, tekstas karba surskribo.

Bildo la dua. Vesperĝigas. La fluo de homoj denove lasas lokon por la homo en la stranga kostumo. Ĉi-foje Fripuljo faras “grandan supreniĝon” laŭ la deklivo, metante antaŭ si ladan barelon. Dum kelka tempo la barelo staras, poste kun bruego ruliĝas suben, al la supreniĝanta homo.

Bildo la tria. La sama loko, iom poste. Bruego de falantaj tirkestoj, tondro de la barelo, ruliĝanta laŭ la pavimŝtona strato (ĉi-foje jam suben...). Plena disfalo de la “kosmoŝipejo”. Svingante la kruron de manekeno kaj alvoke kriante, Fripuljo malsupreniĝas de la deklivo... sidante en kontrabaso sen supra parto kvazaŭ en sledo.

La unuan fojon mi konatiĝis kun la laboroj de la honora artisto de Ukrainio, monumentisto Fedor TETJANIĈ dum ekspozicio. Granda pentraĵo en tradicia maniero. Sed la ornamaĵo de la bildo ne limiĝis nur je bela kadro... Fotoj, algluitaj sur la pentraĵo, pecoj de gazetoj, parto de malnova afiŝo malsupreniĝis de sur la bildo suben, laŭ la muro, transformiĝante al granda trenajo el tute diversaj objektoj starantaj sur la planko. Tie kuŝas plene hazardaj, kiel povas ŝajni, aĵoj: vazo de abrikota konfitajo, “kronita” per turkisa ŝimo; gramofono; rompita seĝo; ŝtofpecoj; rustaj ŝlosiloj de neniukonas-de-kiuj seruroj; brikiloj... Ĉio ĉi per la mano de majstro harmonie formis la unuecan tuton, kaj ĉi ŝi ajn provo ŝanĝi la ordon tuj detruus la komponaĵon.

Simile al tio, ke en la vivo ne ekzistas bagateloj, kaj ĉiu hazardo estas nur malbone komprenita reguleco, nenio estas superflua en la verkoj de la fondinto de fripulismo. Pli kaj pli ofte nuntempaj artistoj ne ilustras realecon, sed formas ĝin.

Artaj objektoj ofte portas kolosan emocian informon, sed la

rigardanto ne ĉiam kapablas legi ĝin. Ne ĉiuj kaj ĉiam komprenas la strangajn de huligananta avangardisto. Por trovi la ŝlosilon de tio, kion nuntempaj artistoj volas montri al la observanto, necesas rigardi la komponaĵon en detaloj kaj kiel unuecan tuton. Majstro ne postulas, ke observanto donu sian “noton” al la verko. Li proponas ion alian: konatiĝi kun la tuta universo de emociaj informoj.

Fripulisman oni povas trakti kiel arton de komponaj improvizaĵoj kun elementoj de tradicia pentrado, skulptado kaj afiŝarto. Ĉiu objekto de komponaĵo meritas atenton. Sed nur kiam vi rigardas la verkon kiel tuton, kaj sentas vin mem parto de la komponaĵo, vi povos diri al la majstro “dankon”. Kun ĝojo, kunsento aŭ simple kun rideto!

* fripulismo – de la anglaj vortoj “free” [frij] (libera) kaj “pull” (tiri).

** Monmartre [monmartr] – tre fama loko en Parizo, konata pro siaj liberaeraj artekspozicioj.

*** segboko – speco de stablo, sur kiun oni aranĝas segotajn ŝtipojn (N.PIV).

La Gomera insulo estas malgranda (ĝi areoj nur 379 kvadratajn kilometrojn) kaj montara. Tie loĝas 19 000 homoj, kaj ĉiuj parolas la hispanan lingvon. La insulo estis konkerita kaj aldonita al la Hispana Imperio en 1405.

Paroli kun la najbaro de la apuda monteto estis tro malfacile por la gomeranoj: endis malsupreniri, promeni, resupreniri... Kaj oni perdis multe da tempo. Do, ili preferis fajfadi. Gomerano kapablas fajfadi aŭdigante sin ĝis tri kilometroj for. Amuze, sed iuj gomeraj birdoj lernis kelkajn kutimajn fajfadofrazojn, kiel "saluton", "aŭskultu", "kien vi iras?" aŭ "kie vi estas?", kaj ili uzas tiun lingvon tute ne konante la signifon!

Kia ĝi estas?

La gomera fajfado (hispanlingve *silbo gomero*, *silbo* = fajfo) ne estas vera lingvo: ĝi estas fajfokodo, kiu anstataŭas la elparoli-



tajn silabojn danke al kvin (aŭ kvar, laŭ diversaj aŭtoroj) "vokaloj" kaj kvar "konsonantoj". Tre gravas melodio, ritmo, frekvenco, paŭzoj, daŭro kaj aliaj nuancoj. Oni diras, ke laŭ la sono eblas diveni, ĉu fajfanto estas viro aŭ virino; tamen, nur spertuloj kapablas rimarki tion. La gomera fajfado enkodigas la hispanan lingvon, do, ĝi uzas hispanajn vortojn kaj gramatikon. Tamen senprobleme eblas fajfadi esperantlingve aŭ franclingve. Ĝi estas kodo, samkiel la latina alfabeto, la morsa kodo aŭ la praegiptaj hieroglifoj. Tiuj ĉi kodoj estas mirindaj, kaj tia estas ankaŭ la gomera fajfado.

La gomera fajfado

Marco TREVISAN, Hispanio

Foje en la montaraj de la Gomera insulo (unu el la Kanariaj insuloj) aŭdeblas birdeca lingvo: fortaj kaj belaj fajfoj. La fajfantoj tamen estas ne birdoj, sed... homoj! Kaj, plej mirinde, ilia fajfado estas ne por amuziĝi, nek por ĝeni aliajn. Ĝi estas por komunikiĝi! Fakte, iuj gomeranoj ne bezonas poŝtelefonojn!



Aliaj fajfolingvoj

La gomera fajfado ne estas la ununura fajfolingvo en la mondo: oni fajfadas ankaŭ en Meksiko (la zapotekoj, mazatekoj kaj aliaj etnoj), en Okcidenta Afriko (ĉefe la diolaa tribo el Senegalo), Turkio, Nov-Gvineo, Nepalo, Venezuelo, Kubo, Usono (indianoj el Teksaso) ktp. Laŭ kelkaj teorioj, pragomeranoj migris al la tri laste menciitaj lokoj dum malfacilaj ekonomiaj epokoj. Kaj aliaj lingvistoj, kiel Marie-Louis MOREAU, pensas, ke la gomera fajfado havas rilatojn al la senegalaj fajfolingvoj. Ŝajne, en Meksiko kaj Afriko nur viroj lernas fajfadon. Ne estas strange, ke ĉiuj lokoj, kie ekzistas fajfolingvo, havas komunajn ecojn: ĉiuj ili estas maldense loĝataj kaj malfacilaj por piediri.

La gomera fajfado tamen, laŭ multaj aŭtoroj, estas la plej evoluinta el ĉiuj ekzistantaj fajfolingvoj. Ne ĉiuj ili estas uzataj por trans-montara komunikado: en Nepalo kaj Afriko ĝi estas uzata ĉefe dum ĉasado kaj aliloke – kiel kaŝkodo.

En 2003 okazis la unua internacia kongreso pri fajfolingvoj, kie kunlaboris instruistoj, lingvistoj kaj esplorantoj el diversaj landoj. Ŝajne, ĝi estis tiel sukcesa, ke ili rekongresumos en 2005.

Instruado kaj lernado

La gomera fajfado estas ankaŭ la nura, kiu estas oficiale instruata en lernejoj, sed tio ĉi estas novaĵo. Dum la lastaj jaroj fajfantoj tre malmultiĝis – eble pro novaj teknologioj aŭ pro pli urbema vivo de la nunaj tempoj... La gejunuloj ne lernas tiun ĉi komunikilon. Tial la gomeranoj aktiviĝis kaj decidis instrui fajfadon en lernejoj.

En 1998 parlamentano Pedro MEDINA prezentis proponon por enigi la gomeran fajfadon en la insulan klerigsistemon. Tiu propono estis aprobita de la tuta parlamento de la Aŭtonoma Komunumo (simila al federacia ŝtato de aliaj landoj) de Kanariaj Insuloj, kaj post pli ol unu jaro da laborado kaj kunlaborado de universitataj kaj neuniversitataj instruistoj, fajfospertuloj, psikologoj, lingvistoj, gepatroj de ontaj lernantoj ktp., la 10an de januaro 2000, komenciĝis la instruado.

La gomera fajfado lerneblas en bazlernejoj kaj mezlernejoj: 15 minutoj semajne por infanoj inter ses kaj ok jaroj; 30 minutoj semajne por infanoj inter ok kaj dekkvar jaroj; mezlernejanon inter dekkvar kaj dek ses jaroj havas nedevigan lernobjekton pri gomera fajfado.

Gomera fajfado kaj Unesko

Tiu ĉi komunikilo estas tiom rara kaj mirinda pro sia beleco kaj pro historiaj, lingvistikaj kaj antropologiaj kialoj, ke homoj kiel Moisés PLASENCIA agadas por konvinki Uneskon, ke ĝi devas esti akceptita kiel Kultura Heredaĵo de la Homaro, ĉar ĝi perfekte konformas al la postuloj de Unesko. Tio ĉi gravas, ĉar tiel oni povus peti oficialan subtenon de internaciaj organizoj, do, ne nur de la hispana kaj kanaria registaroj.



Scivolema? Se via komputilo povas aŭdigi MP3-dosierojn, vi povas aŭdi ekzemplon de gomera fajfado ĉe la paĝo <<http://www.insel-la-gomera.de/silbo.htm>>, la rekta ligo al la aŭdo-arĥivo (MP3) estas <<http://www.insel-la-gomera.de/silbo.mp3>>. La frazo signifas: "Mi tre ĝojas pro tio, ke vi vizitis min ĉi-vespere. Salutojn de Emilio al Germanio" (originale: "Estoy muy contento de que hayáis venido esta tarde a visitarme. Muchos saludos de Emilio a Alemania").

<LEGU>

BUSNEL, R.G. kaj CLASSE, A. 1976. *Whistled Languages*, Berlin: Springer.

Dank' al eüropaj esperantistoj, precipe al Germanio, Francio, Belgio kaj Danio, en fora benina vilaĝo Kodji oktobre 1999 estis fondita Esperanto-lernejo Jules VERSTRAETEN. Ekde tiam evoluas la tuta projekto kaj ĝia interna ideo malgraŭ ĉiaspecaj malfacilaĵoj, kiuj evidente ne eviteblas en la Tria Mondo.

Jam pasis kvar jaroj, kaj la infanoj, kiuj komencis lerni de la "naskiĝo" de la lernejo, ekde oktobro 2004 estos en la kvina lernejo-jaro, kaj ĉiam kun la samaj sindediĉo kaj entuziasmo por Esperanto. La lernejo konsistas el nur tri klasoj, pro tio jam de la antaŭpasinta jaro necesis disponi-

enspezi sufiĉe da mono per vendado de varoj el la lernej-ĝardeno en la loka bazararo.

La tuta ĉi-somera laboro – fosado de puto, pretigo de kampo por terkultivado, konstruado de kvina klasĉambro el loka materialo (konstruado el pli fortika materialo estas prokrastita) ktp. certe ne eblus sen la sindediĉo kaj bonvolo de la infanoj. Ili ja konscias pri la utilo de klereco kaj sekve ne ĉiam atendas kontribuon de siaj gepatroj, kiuj, bedaŭrinde, ankoraŭ ne tute komprenas, ke klerigado devas esti la prioritato.

Per la ĵus fosita puto ni ankaŭ celis enkonduki la infanojn al bredado kaj terkultivado ne nur kiel agadoj, kiuj kreas profiton. Tio estas ankaŭ pedagogia klopodo instrui, kiel vivteni sin pere de aferoj el sia propra medio. La terkultivado jam komenciĝis, sed

La konstruado de la akvofonto estas financata de Sabine kaj Henning HAUGE, Germanio. La kostoj de instruado, korespondado kun aliaj bazlernejoj tra la tuta mondo estas subvencitaj de la organizo *Stiftung-Mondo* (Martin SCHAEFFER, li subvencias ankaŭ la beninan E-movadon), Agnes GEELLEN, Jules VERSTRAETEN (Belgio), Robert DION kaj Jacques MORNET (Francio), Allison BROADBENT-CODJO (Kanado) kaj aliaj. Multe kontribuis ankaŭ la *Agado Espero* de UEA. Multaj aliaj kontribuis per sendado de ludiloj kaj libroj. La infanoj kaj la tuta vilaĝo de Kodji tre dankas ĉiujn kaj daŭre esperas kalkuli je ili en la estonteco. Nia Esperanto-movado aparte dankas s-ron Houenavo PIERRE, kiu faras ĉion eblan por ke la instruado de Esperanto en la lernejo estu efika. Li respondecas ankaŭ pri instruado al la infanoj pri bredado kaj terkultivado.

Fine, kune kun la infanoj de nia lernejo, mi volus esprimi sincerajn kondolencojn al sinjorino Sabine HAUGE, kiu antaŭnelonge perdis sian edzon – Henning HAUGE. Jen granda arbo, kiu falis en la arbaro, kaj mi ne scias, ĉu oni denove povos paroli pri la arbaro sen tiu giganta arbo. Trista periodo ne nur por nia lernejo, sed ankaŭ por la tuta Esperanto-movado...



KOMPLEZE DE LA AUTORO



Akvo-fonto – danke al esperantistoj!



gi kvaran klasĉambron, por ke la lernejo jaron post jaro atingu la sesnivelan gradon, kiel rekomendas la benina klerigsistemo. Ĝuste tio fariĝis unu el la ĉefaj kialoj de mia vizito al Benino somere 2003.

Malfeliĉe, la kolektita sumo ne tute sufiĉas por konstrui la mankantan parton de la lernejo. Intertempe aldoniĝis alia tikla malfacilaĵo: malsana kaj malsata infano certe ne povas multon lerni, eĉ en la plej bela lernejo.

Multaj infanoj en la lernejo malsaniĝis pro manko de taŭga trinkebla akvo. Ĉar urĝis solvi tiun problemon, ni do kontraŭ granda parto de la kolektita sumo decidis ene de la lernejo fosi puton. El la puto la infanoj povas trinki relative pli puran akvon. Krome, tio ankaŭ ebligas terkultivadon pere de akvumado, precipe dum malseka sezono, kiam ofte mankas pluvakvo. Tiam legomoj kaj fruktoj ofte multekostas, kaj do la lernejanon povos

la bredado ankoraŭ ne, ĉar necesas por tio taŭga ejo. La infanoj mem uzos multajn lokajn materialojn por realigo de la tuta projekto. Do, kiel oni proverbe diras, ni ne donas al ili fiŝon, sed instruas, kiel fiŝkapti.

La infanoj dum tiu ĉi somero multe ludis, ĉar mi kunportis plurajn balonojn kaj novajn (t.e. ankoraŭ ne konatajn de ili) ludojn, kiel korbopilko, volanludo ktp.

Por bona funkciado de la tuta projekto, mi kompilis taŭgan statuton kaj regulojn por la administrado de la lernejo, ĉar se terkultivado kaj bredado fariĝos bona financa fonto, necesas havi regulojn pri tio, kiel administri la monon. Pri la financoj do respondecas komitato de infanoj kun helpo de la Esperanto-instruisto (Houenavo PIERRE) kaj la lernejestro. Ni nur esperu, ke el la naturo fontos granda parto de la solvo por multaj problemoj en la lernejo *Jules VERSTRAETEN* de Kodji!

<KONTAKTU>

Por pliaj informoj kaj subteno bv. direkti vin al la iniciatinto – Jean CODJO, Kanado (<jean_codjo@yahoo.com>, la UEA-konto *jeco-h*), la organizo *Stiftung-Mondo*, Martin SCHAEFFER, Germanio (<stiftung-mondo@web.de>), Agnes GEELLEN, Belgio (<agnes@esperanto.be>) aŭ al UEA – la projekto *Agado Espero*. Vi povas sendi rekte al la lernejo ludilojn, didaktajn materialojn kaj aliajn aĵojn, kiuj povus kontentigi infanojn. La adreso: EPP JV-Kodji, c/o Esperanto-Afriko ONG, BP 383 Lokossa-Mono, Benin.

<CETERE>

La agado *Lernejoj por evoluo* estas la tria, plej juna branĉo en *Agado Espero*. La raporto el Benin tre adekvate ilustras, kion eblas fari per nia helpo. Estas interkonsentoj pri kunlaboro jam kun lernejoj en Benino, Albanio kaj Kolombio. Krome, ni starigas la unuajn kontaktojn ankaŭ kun aliaj afrikaj lernejoj. Nia espero estas sukcesi, iom post iom, pligrandigi la rondon de partoprenantaj lernejoj, ekzemple, ankaŭ en Azio. Kontribuojn por tiu agado akceptas la fondaĵo *Agado Espero* de UEA. Aldona indiko: por *Lernejoj por evoluo*.

Agnes GEELLEN, Belgio

“Al afrikanoj ne mankas projektoj por plialtigi siajn viv-kondiĉojn. Mankas motivo!”

Nadine RIVIÈRE estas 19-jaraĝa francino. Antaŭ unu jaro ŝi kun sia familio vojaĝis al Benino kaj tie gastis, dank’ al benina esperantisto Gaston HOUSSOU, laŭ afrika maniero (ili konatiĝis kun li antaŭ 6 jaroj, dum la UK en Montpellier). La celo de tiu ĉi vojaĝo estis helpi al la *Orfa Lernejo Esperantista*, kies direktoro estas s-ro HOUSSOU. Tiu privata lernejo akceptas georfojn de la vilaĝo Tozounmé (15 km de Lokossa) kaj infanojn de malriĉaj familioj, kiuj ne povas pagi por la publika lernejo (malgraŭ ke ĝi estas malmultekosta). La familio renkontis infanojn kaj iliajn familiojn, iomete instruis Esperanton kaj, cetere, kunportis monon, donacitan de du francaj asocioj por konstruado de nova klas-ĉambro. **KONTAKTO** petis Nadine rakonti pri la impresoj de sia vojaĝo.

- Mi kompreneble sciis, ke ni iros al tre malriĉa lando, kie ĉio mankas (akvo, elektro, manĝaĵo, edukado...) kaj certe provis imagi,



Kun novaj amikoj en Tozounmé

kia estas vivo tie. Sed mi imagis tion fuŝe. Pli ĝuste, mi komprenis, ke estas tre malfacile havi **objektivan** ideon pri afrika ĉiu-taga vivo, kiam oni mem ne spertis ĝin. Ĉio estas tiom malsama compare al la okcident-eŭropa vivo!

Unue, tre malfacila estas la lingva situacio en Benino. Efektive, en tiu lando oni parolas diversajn lingvojn, interalie, la lingvon Fon en la suda regiono, kie ankaŭ ni estis. La franca estas la “oficiala lingvo”, kiun oni instruas en lernejoj. Sed malmul-

taj homoj en la vilaĝoj (kaj eĉ en grandaj urboj!) sci-povas paroli ĝin. La beninanoj videble urĝe bezonas komunan lingvon, kiu estus multe pli facila ol la franca.

Due, ni ekvidis, ke ne mankas al afrikanoj projektoj por plialtigi siajn viv-kondiĉojn. Sed, malfacile, ŝajnis al ni, ke malmultaj el ili realiĝas. Plej bonokaze ili realiĝas malrapide... Kaj tio okazas ne nur pro manko de mono kaj helpo, sed ankaŭ pro manko de **motivo**.

Trie, ni estis tre mir-ig-itaj pri

influo de religio en la benina socio. Mi mem ne estas religiema homo, sed mi bone komprenas kaj akceptas, kiam iu **dediĉas** tempon aŭ monon al religio. Tamen en tiu lando, kie ĉio mankas, ni kun bedaŭro ekvidis, ke ja troviĝas grandaj mon-sumoj por konstruado de preĝejoj aŭ aliaj religiaj agadoj, dum oni povus pli utile uzi ilin por sano, instruado, manĝaĵoj ktp...

Sed malgraŭ malfacilaj viv-kondiĉoj ni ĉiam estis tre bone akceptataj. La kutimo en Afriko postulas, ke gasto (ekster-landano aŭ sam-landano) estu reĝe bonvenig-ita, ke oni donu al li tion, kion oni neniam povas aĉeti por si mem... Saluton kaj dankon al ĉiuj infanoj kaj amikoj de Tozounmé!

motivo – la sento, kiu igas nin ion fari

orfo – infano sen patro, patrino aŭ ambaŭ gepatroj

impreso (impresi) – influo al ies sentoj

dediĉi – fordoni

objektiva – bazita sur realeco

Pajto AJTO, Togolando

La edzino kuŝis en la lito. Dum la tuta tago ŝi nenion manĝis, nur **ĝemadis**. Kiam ŝi rimarkis, ke la edzo estas for, ŝi levis la kapon kaj klopodis atingi la kuirejon por ion manĝi. Ŝi estis tre malsata. Ĉar la tutan tagon ŝi kuŝis kaj ĝemis en la lito, la edzo konsideris ŝin ne malsata, sed malsana. Tamen ŝi mem sciis, ke ne malsana, sed malsata ŝi estas. Labori estis por ŝi tiel malfacile kaj peze, ke ŝi ĉiam havis **truojn** por ne fari tion. Kiam la edzo eniris la domon (li ĉiam **fidis** sian edzinon kaj multe kuradis por “malsana” ŝi), la edzino rapidege eniris la dormejon, kuŝiĝis kaj ekĝemis: “Mia dorso, mia kapo, miaj kruroj! Ho, mi tuj mortos!” La edzo tute ne sciis, kion fari. Li volis irigi ŝin al kuracisto, sed ŝi malkonsentis – eble, ĝis nokto ŝi ekfartos pli bone. Kiam la suno malaperis, ŝi vere ekfartis pli bone; kaj nokte, kiam ne plu estis tempo por labori, ŝi jam tre bone fartis. Jen ŝi manĝis tiom multe, kiom postulis la edzo. En la nokto ŝi estis tute sana. Sed, kiam frumatene ŝi rimarkis, ke la tago estos plena je farendaĵoj, ŝi denove “malsaniĝis”. Ŝi kondukis tiel tiom longe, ke ŝia tuta persono **trem-**

Pigroboj



piĝis en malsana stato. Ŝi maldikiĝis kaj finfine mortis. Kial?

Certe en ŝian korpon eniris estuletoj, kiuj mortigis ŝin. La moderna medicino tute ne povas malkovri ilin, sed ili certe ne estas **mikroboj**. Tiuj estuloj estas ali-naturaj. La edzo finfine malkovris tion, kio malsanigis lian edzinon: **PIGROBOJ!**

Pigroboj respondecas pri multaj aferoj. Rigardu la nunajn lernantojn aŭ rememoru propran lernadon, kaj vi malkovros multon kaŭzatan de pigroboj. Lernantoj ne povas iri al la lernejo – ili restas sur stratoj

ĝis fino de la tago, kaj tiam ili iras hejmen. **Ruzaj** lernantoj metas panon en la buŝon, **maĉas** ĝin kaj poste kun bruego el-buŝ-igas la maĉaĵon. Timante, la instruistoj venigas la lernantojn al kuracisto, de kie la ruzuloj simple iras hejmen... Tiuj, kiuj malsaniĝas je pigroboj multfoje en la jaro, ofte ne sukcesas en la ekzamenoj.

Nekredeble! Afo komprenas nenion pri matematiko kaj ĉiam ricevas malbonajn notojn. Tamen babilante kun amikoj li ĉiam diras, ke ankaŭ li havos bonan noton dum la ekzameno. Okazis provekzameno. Lia noto estis denove malbona. Sed li tute ne koleris: “Dum vera ekzameno noto ja estos bona!” Monatoj pasis, kaj jen alvenis la ekzamena tago. Kvazaŭ io eniris la junan Afon, li sentis sin tute malstreĉita dum la ekzameno kaj... li sukcesis! Kial Afo ekhavis plej altajn notojn? Ĉu io eniris lin? Eble pigroboj? Aŭ... malpigroboj?..

En nia komputila erao multas **virusoj**, kiuj **detruas** komputilojn. Sed pli ofte, kiam laboro ne



estas farita, neniu viruso agas – simple la uzanto... amikiĝis kun pigroboj. Sed kiel facilas kulpigi komputil-virusojn, ĉu ne?... Ankaŭ en nia Esperanto-movado, cetere, loĝas homoj, trafitaj de pigroboj. Inter tiuj, kiuj komprenigas, ke pro malsano ili ne povas plenumi taskojn, tre malmultas tiuj, kiuj vere estas tiel malsanaj. La plej granda parto estas simple trafita de pigroboj!

detru – malbonigi; neniigi

fidi – kredi

ĝemi (ĝemado) – sono, kiun oni faras, kiam io doloras

pigrobo – de la vorto “pigra” – mal-laborema

trujo – lertajo

tremi (tremiĝi) – enakvigi, ĉi tie: plene eniri

mikrobo (viruso) – estulo, kiu kaŭzas malsanojn

ruza – el-pens-ema (en malbona senco)

maĉi – dis-pec-igi manĝaĵon per la dentoj

Plejmulto da japanoj ŝajnas ami anglismojn"

La angla lingvo komencis sian prestiĝajn kaj signifokreskon en Azio ekde la momento, kiam la brita imperio perdis sian politikan signifon – en la dua duono de la 20a jarcento. Kiu memoras, ke en Hinda Unio oni iam serioze diskutis anstataŭigi la anglan per la hindia? Nek en Indonezio, nek en Filipinoj la nederlanda (respektive la hispana) havis veran ŝancon kontraŭ la angla. Ankaŭ en iama Hindoĉinio scipovo de la franca fariĝas pli kaj pli generacia distingilo: junaj vjetnamoj ne plu iras al Parizo por studi, sed al Usono, ĉar tiu, kiu volas progresi en malfermiĝanta Vjetnamio, devas scipovi la anglan. Eĉ la malajzia ĉefministro Mahsathir Mohammad, kutime tre kritikema kontraŭ la okcidento, admonas siajn civitanojn pli intense lerni la anglan. Kaj en Ĉinio la rapida ekonomia malfermo de la lando kaŭzis, ke en grandurboj, kiel Ŝanhajo, oni pli facile povas interkompreniĝi per la angla ol en la iama brita kolonio Honkongo.

Koncize, tia estas la lingva situacio en Orienta Azio. Ĉu Esperanto entute havas ŝancojn tie? Speciala fokuso direktiĝas ĉi-foje al Japanio. Jam delonge japanoj vojaĝas al ĉiuj mondopartoj, tamen la scipovo de la angla daŭre estas tre limigita en ĉi tiu lando. Ĉu la situacio tie estas tute alia ol en la najbaraj ŝtatoj? Jen intervjuo interparolo kun esperantistoj el Japanio – spertaj pri lingvopolitiko: Kimura Goro estas japana lingvosociologo kaj docento ĉe la Keio-Universitato en Tokio. Yamasaki Seiko estas iama prezidanto de Japana Esperanto-Instituto kaj nuntempe membro de la Akademio de Esperanto. Ulrich Lins estas iama vicprezidanto de UEA kaj aŭtoro de *La Danĝera Lingvo*.

- Kiu lingvoj plej popularas en Japanio? Kiujn fremdlingvojn oni lernas devige kaj kiujn laŭvole?

Kimura Goro (KG): En ĉiuj mezlernejoj (ekde la 7a ĝis 9a lernejo) oni preskaŭ devige instruas la anglan. En universitato aldoniĝas plej ofte la franca, germana, hispana, ĉina aŭ korea. Aliaj lingvoj malofitas.

Ulrich Lins (UL): Necesas precizigi, ke universitataj studentoj lernas, aldone al la angla, kiel duan lingvon unu el la nomitaj. Se temas pri populareco, la sinsekvo estas laŭ iuj fontoj la jena: la ĉina, franca, germana, korea, rusa kaj hispana. Laŭ aliaj fontoj – la ĉina, germana, franca, korea, hispana kaj rusa. La lingvo-

La angla kiel defio kaj minaco



Kimura Goro



Ulrich Lins

vo-preferoj ekster la universitata medio ne nepre estas la samaj. Ekzemple, inter la lingvaj kursoj spektblaj en televido grandan popularecon ĝuas tiu de la itala.

- Ĉu internaciaj firmaoj havas ne japanan lingvon kiel kompanian lingvon?

KG: Jes, grandaj multnaciaj kompanioj – precipe skribe por dokumentoj – uzas ankaŭ la anglan. Eĉ germanaj aŭ francaj kompanioj uzas la anglan!

Yamasaki Seiko (YS): Mi laboris en internacia komerca kompanio japana. Tie la oficiala, aŭ komuna, lingvo inter oficejoj tra la mondo estas la angla kaj tiu inter la japanaj oficejoj – la japana. En praktiko tamen tio estas pli ĝuste pia deziro de la ĉefstabo en Tokio, kaj japanaj oficistoj uzas la japanan por internacia komunikado je maltrankviligo de lokaj diverslingvaj kunlaborantaroj, ĉar tiuj ĉi ne scipovas la japanan, kiu ne apartenas al la fakkono postulata je la dungo. La japana estas la plej maltaŭga por tiu celo.

- Kiun lingvopolitikon rilate fremdlingvan instruadon sekvas la japana registaro kaj aliaj gravaj sociaj rolantoj?

KG: Ili ĝenerale emas postuli la anglan de ĉiuj, por ke Japanio povu ludi gravan rolon en internacia merkato/politiko ktp...

YS: En nia kompanio la angla ne estas la sola ne japana lingvo postulata: oni devas nepre posedi la anglan kiel la interoficejan lingvon, kaj la nacian kiel la laborlingvon surlokan – la germanan en Germanio, la ĉinan en Ĉinio ktp., ĉar ĝi estas la lingvo de la klientoj, do estas strikta dulingvismo. La hegemonio de la angla en la japana ĝenerala publiko ne aplikeblas al la medio de internacia komerco.

- Ĉu vi povas rakonti pri konkretaj planoj de la japana edukminis-

terio plivigli fremdlingvan instruadon en lernejoj?

KG: Estas provoj enkonduki la anglan jam en bazlernejo, ekde la kvara lernejo. Kelkaj (malmultaj) lernejoj eĉ jam komencis parte instrui en la angla. Parolante pri fremdlingva instruado, oni plejparte celas nur la anglan.

- Kiun rolon ankoraŭ havas la nacia lingvo kiel scienca lingvo?

KG: La situacio en Japanio similas al tiu en Germanio: en natursciencoj kaj ekonomiko pli kaj pli dominas la angla, en liberaj kaj sociaj sciencoj oni ankoraŭ suface multe uzas la nacian lingvon.

- Kial, laŭ vi, japanoj tiom intense lernas la anglan?

KG: Oni kredas, ke la "tuta mondo" parolas la anglan.

- Ĉu oni problemigas aŭ pridiskutas la fenomenon de Japlish/Jenglish (japan-angla mikslingvaĵo)?

KG: Relative ofte aperas artikoloj pri la abundo de fremdvenaj vortoj. Sed kritikantoj estas malplimulto. La plimulto ŝajnas ami anglismojn. Ankaŭ tiu ĉi situacio similas al Germanio, laŭ mi.

UL: Mi ne kredas, ke plimulto da japanoj vere "amas anglismojn". Multaj, t.e. unuavice la gejunuloj, volonte uzas novajn vortojn, supozante ke ili estas modernaj, ne multe pensante pri tio, ĉu ili estas angladevenaj. Post iom da tempo ili konsideras tiujn vortojn jam japanaj. Tiuj, kiuj vere scipovas la anglan, tute malŝatas abundon de anglismoj.

- Ĉu vi scias, kiom da mono "moviĝas" pro fremdlingva instruado en via lando?

KG: S-ro Tukahara Nobuyuki de la Universitato de Nagoya skribis, ke en 1997 la enspezoj de privataj lingvo-instruaj lernejoj atingis 992 220 000 eŭrojn**.

- Laŭ vi, ĉu estas bona didaktike

la fremdlingva instruado? Ĉu ekzistas iuj specifaj, kiuj igas la lernadon de fremdaj lingvoj malfacila por japanoj?

KG: Certe por japanoj multe pli malfacilas lerni iun eŭropan lingvon pro granda malsimileco. La korean, ekzemple, oni lernas pli facile.

- Ĉu japanoj konscias pri lingva problemo aŭ diskriminacio?

KG: Ĝenerale ne. Eĉ fakuloj pri diskriminacio foje ne komprenas, kio estas "lingva diskriminacio" – tion mi spertis en konferenco de fakuloj-sociologoj.

- Ĉu Japana Esperanto-Instituto konkrete kaj aktive propagandas Esperanton kaj provas levi la konscion pri tiu lingva fenomeno?

YS: La japanaj esperantistoj ne komprenas profunde, ke la lingva problemo en Japanio estas tiu de la literoj. Certe troviĝas alta proporcio de adeptoj de la movado por aboli la ĉinan ideografion kompare kun la eksteresperantista medio, sed ili ne estas multaj. La litera problemo estas pli grava ol tiu de internacia lingvo, ĉar ĝi koncernas la propran denaskan lingvon de japanoj***.

UL: La premo lerni la anglan nuntempe ŝajnas nerezistebla. Sed kiel enkonduke aludite, la sukceso de japanoj en lernado de la angla ne estas granda. Ĉu ili vere ŝatas la anglan, estas dubinde. Mi ofte renkontas ankaŭ pledantojn por multlingveco, do ekzemple por lernado de la germana. Japanaj sciencistoj de la germana iom moketas pri nesufica "lingva lojaleco" de germanoj, esprimiĝanta ekzemple en senpensa alpreno de anglismoj.

KG: JEI organizas publikajn simpoziojn pri lingvoproblemoj, lingvolernado ktp. Lokaj kongresoj kutime havas nefermitajn programojn. Laste mi ŝatus diri, ke pozitiva signo por multlingveco estas, ke ekzistas provoj instrui la lingvojn de najbaraj regionoj, ekzemple la korean en Kjuŝu kaj la rusan en Hokkaido.

Enkonduko kaj demandoj de Marko Naoki LINS (Brusela Komunikadcentro)

* Vidu ekzemple la retejojn <<http://www.english.com/>>, <<http://www.daninjapan.com/jenglish/>>, <<http://www.cycleboy.com/jenglish2.html>>, <<http://www.tokyotales.com/japlish/index.html>>.

** Konsultu: "La angla furiozas en Japanio", Dafydd ap FERGUS, revuo Esperanto, 1155 (1), januaro 2003, p. 9.

*** Pli detale: Yamasaki Seiko: "Por pli aktiva lingvopolitiko", red. Detlev BLANKE, UEA, 1999.

Reen al la 19a jarcento, aŭ: Kiel oni lernas la anglan en tipa mezlernejo. Impresoj de asista angla instruisto laborinta en Japanio

Se oni nur supraĵe scias pri la stato de anglalingva edukado en Japanio, oni eble supozos, ke Japanio estas vere dulingva lando. Oni ofte citas la fakton, ke japanaj lernantoj studas la anglan kutime ses jarojn en la lernejo (tute devige oni studas la anglan nur tri jarojn, sed en la praktiko kutime ses, kaj se oni pluiras al la universitato, eĉ ok aŭ pli). Mi pasigis du jarojn en Japanio laborante en japana mezlernejo kiel asista angla instruisto (miaj studentoj estis lernejanaj de la 7a ĝis 9a lerno-jaroj), kaj trovis la realan staton de anglalingva edukado ankoraŭ tre malproksima de la idealo.

Ĉiujare la japana registaro verbas pli ol mil universitat-diplomitojn el anglalingvaj landoj kiel asistajn anglajn instruistojn. Ĝi venigas ĉi tiujn gejunulojn al Japanio kaj dissendas ilin tra la lando al mezlernejoj kaj gimnazioj, kie ili servos kiel asistaj instruistoj almenaŭ unu jaron. La celoj de ĉi tiuj asistantoj estas, laŭdire, internaciigo (t.e. doni internaciajn kontaktojn al kutime izolitaj japanoj) kaj plibonigo de la anglalingva instruado.

Mi do estis unu el tiuj varbitoj, kaj, kiel la granda plejmulto da ili, ankaŭ mi estis sendita al tre kampara, tradiciema urbeto. Ĝuste en la kamparo la bezono de internacia kontakto estas plej bezonata – la plejmulto da japanaj kamparanoj ja neniam havus la okazon persone renkonti eksterlandanojn sen tiu registara programo. Kvankam neniu kampara urbeto tute similas al ĉiu alia, ŝajne mia urbeto estis sufiĉe reprezenta de "tipa" japana kampara urbeto.

Do, kiam mi eklaboris en "mia" mezlernejo, mi baldaŭ konstatis, ke malgraŭ tio, ke oni studas la anglan lingvon, oni apenaŭ lernas praktike uzi ĝin. Kutima angla leciono konsistas ĉefe el lernado de gramatiko, parkerigado de vortoj kaj tradukado de tekstoj. Oni apenaŭ faras ajnajn konversaci-ekzercojn (oni faras ilin nur kiam la eksterlanda helpanto vizitas la klason). La rezulto de tia instrumetodo estas ke la lernantoj bonege konas la gramatikon kaj multajn vortojn, sed preskaŭ ne kapablas utiligi ilin por komunikaĉo! Kompreneble, troveblas ankaŭ multaj instruistoj, kiuj uzas modernajn instrumetodojn, sed ili estas la esceptoj.

Sed kial instruistoj tiel rezistas modernajn metodojn? Mi trovis almenaŭ du kialojn: tradicio kaj universitateneraj ekzamenoj.

Tradicio ludas tre gravan rolon



Tre tipa japana klasĉambro



Tipa japana mezlernejo



Japanaj mezlernejanaj

en japanaj lernejoj, kaj multaj tradicioj devenas de la malfrua 19a jarcento, kiam la japana registaro klopodis rapide kaj radikale "okcidentecigi" la landon. Ĉi tiu okcidentecigado okazis grandparte laŭ prusa modelo (Japanio havis multajn kontaktojn kun Prusio tiutempe, kaj ŝajne japanoj trovis la prusan ordemon simpatia). La prusa influo ankoraŭ forte sentebles en japanaj

lernejoj: la ĉiutagaj formalajoj, la armeeca ordemo, kaj, plej frape, la uniformoj! Sentroige, la lernejaj uniformoj de la knaboj estas faritaj laŭ la stilo de prusaj soldatuniformoj de la 19a jarcento!

La alia restanta prusa influo estas la t.n. "gramatik-traduka" metodo de lingvoinstruado. Antaŭ cent jaroj ĝi estis la plej ofta metodo de lingvoinstruado ankaŭ en Eŭropo

kaj Usono, kaj ĝi ankoraŭ estas uzata por instrui klasikajn lingvojn, kiel la latinan kaj grekan. Tiu metodo tute taŭgis por la celoj de la tiama Japanio: japanoj tiutempe preskaŭ neniam vojaĝis eksterlanden, do, oni celis ĉefe tradukadon, ne konversacion. Sed tiu gramatik-traduka metodo profunde enradikiĝis, kaj oni nur nun kun grandegaj malfacilaĵoj klopodas ŝanĝi ĝin.

Ankoraŭ unu problemo estas la ekzamenoj por eniri la universitaton. Anglalingva scio estas absolute necesa por sukcesi en tiuj ekzamenoj. Sed kia scio? Nu, same kiel la instrumetodoj, ankaŭ la ekzamenoj estas eksmodaj. Oni devas respondi demandojn pri diversaj detaloj de angla gramatiko kaj pri la signifo de vortoj, sed oni bezonas nek paroli nek aŭskulti la anglan. Krome, oni devas kompreni, ke la universitateneraj ekzamenoj estas la plej grava celo de la mezlernejoj kaj gimnazioj. Eĉ kiam instruistoj deziras pli moderne kaj kreeme instrui, ili ofte ne havas multe da libereco, ĉar ili sentas grandan premon de la gepatroj de siaj lernantoj instrui nur tion, kio gravas en la ekzamenoj.

Do, ŝajnas ke malgraŭ multaj belaj paroloj de politikistoj kaj teoriistoj pri "komunikeca" lingvoinstruado kaj malgraŭ la klopodoj de entuziasmaj instruistoj kaj ties eksterlandaj asistantoj, ne povos okazi profunda transformiĝo de la fremdlingva edukado ĝis kiam la ekzamensistemo estos reformita kaj la ĝenerala lernejkulturo estos tute modernigita.



Anna kaj Mati PENTUS, Rusio

Boris KOLKER. *Vojaĝo en Esperanto-lando*. Perfekta kurso de Esperanto kaj Gvidlibro pri la Esperanta kulturo. Rotterdam: UEA, 2002. 278 paĝoj. ISBN 92 9017 078 6.

Nuntempe eblas trovi multajn voĵojn por ellerni Esperanton. Oni povas legi facilajn lernolibrojn, aliĝi al interreta kurso aŭ loka rondo de esperantistoj. Tamen venas tempo,

Rekomendinda lernilo por progresantoj

kiam la libro estas tralegita, la baza kurso estas finita kaj la lernanto atingis la nivelon de sia amiko-instruisto. Kion fari, se la deziro perfektigi ne estingiĝis kaj la menso postulas ion pli malfacilan, pli profundan? Ni rekomendas tiukaze la libron *Vojaĝo en Esperanto-lando* de Boris KOLKER. Oni povas eĉ simple admiri tiun ĉi libron, ĉar ĝi estas perfekte eldonita. Bona papero, atentokapta kovrilo, abundo da ilustraĵoj, pripensita strukturado de la materialo per agrablaj oranĝaj koloro – ĉio ĉi allogas la atenton al la eldono. Ni lasu neesperantistojn ĝui la aspekton kaj iru al la enhavo.

Tiu, kiu serĉas lernilon, povas konsideri *Vojaĝo*-n kiel lernolibron, konsistantan el 26 lecionoj. Ĉiu leciono enhavas kelkajn tekstojn (prozajn kaj versajn), komenton kaj ekzercaron. Pure gramatikaj klarigoj forestas, sed amantoj de tiuspeca materialo ne ĉagreniĝu. Ili povas trovi interesajn lingvosciencajn fragmentojn kaj evoluigi kaj perfektigi sian lingvosenton pere de eltiraĵoj el verkoj de elstaraj aŭtoroj. 15-20 ekzercoj fine de ĉiu leciono vere donas bonan lingvan

praktikon, ĉar plimulto el ili devigas “rakonti”, “klarigi” kaj “verki” ion.

Tamen *Vojaĝo* estas pli ol nur lernilo, ĝi estas antaŭ ĉio “gvidlibro pri la Esperanta kulturo”. Ĉiu homo konas historion kaj eminentulojn de sia lando, ĝiajn kutimojn, iujn kuriozajn faktojn. Tiuj “ĝeneralaj scioj” faras lin “malfremdulo” en la lando, li komprenas citaĵojn kaj aludojn, kapablas deĉifri gazetajn titolojn ktp. Same esperantistoj devas koni la verdan kulturon, kaj tiu ĉi kompetenta libro helpas al ili.

Lernantoj, ĵus finintaj bazan kurson, ofte demandas, kion ili legu. Nia unua konsilo estas: la *Vojaĝo*-n; sed pli serioze ni dirus, ke en tiu ĉi krestomatia estas kolektitaj fragmentoj el preskaŭ ĉiuj plej famaj verkoj, do la legaĵlisto estas preta, kaj oni povas elekti la plej taŭgan verkon.

Vojaĝo inkluzivas ankaŭ ideojn kaj proponojn pri organizado de laboro en Esperanto-klubo, pri aktiva vivo en Esperantujo.

Se vi volas ĝui legadon, aŭ prepari vin por ekzamenoj, aŭ interese aranĝi kunvenon, aŭ perfektigi viajn sciojn, ni rekomendas al vi tiun ĉi rimarkindan libron.

Pri *Vojaĝo*:

Vojaĝo en Esperanto-lando estas certe la plej riĉe ilustrita originala libro en nia eldonhistorio (Trevor STEELE, Ĝenerala Direktoro de UEA, membro de la Akademio de Esperanto, Aŭstralio/Nederlando).

...kvazaŭ moderna enciklopedieto pri Esperanto... (Raita PYHÄLÄ, Finnlando).

...Ekstreme rekomendinda lernolibro por kursoj por progres(eg)intoj... (Bertilo WENNERGREN, membro de la Akademio de Esperanto, Germanio).

La libro estas bona referencaĵo por prepari sin al la meznivela internacia ekzameno de ILEI/UEA (LEE Chong-Yeong, vic-prezidanto de UEA, Koreio).

...bona bazo por tiuj, kiuj volas senti sin hejme en la tutmonda Esperantujo... (Slavik IVANOV kaj Aleksandr OSOKIN, Rusio).

...La libro, laŭ mi, meritas esti celo de la vivo (Mikaelo BRONŝTEJN, verkisto kaj kanzonisto, Rusio).

...unu el la plej gravaj kaj uzablaj libroj, kiuj iam ajn aperis en Esperanto (Leif NORDENSTORM, Svedio).

BUMERANĜE

“Movada, sed altnivele!”

En *La ondo de Esperanto* (2:2003) oni povis legi riproĉeton al tiu ĉi bona revuo, ke ĝi estas “tro movadeca”. Mi ne bone komprenas: ĉu movadeca karaktero estas peko, kiun oni toleras ĝis certa punkto? Eble en ideala kazo la revuo entute ne estu “movadeca”? Ĉu pli bone vendebblas “ne-primovadaj” revuoj?..

Certe, ĉiu redakcio havas la rajton serĉi la plej taŭgan voĵon por paroli al la konscienco de la leganto. Tamen ĉi tie kuŝas la danĝero praktiki nuran komercan principon: “oni donu al homoj tion, kion ili ŝatas [legi]”. Kulturaj postuloj de homo, tamen, ne estas tiel unuecaj, kiel la biologijaj, kiujn atentus komercistoj. Jam antikva aŭtoro skribis, ke la kamparanoj aŭskultas rakontojn pri virbovoj, la maristoj pri ŝtormoj, la militistoj pri bataloj. Pri kio interesiĝas esperantistoj?.. Certe, ili interesiĝas ne nur pri “strikte movadaj” temoj. Malfacilaĵo de serioza kulturrevuo kuŝas en la ŝarĝo doni al siaj legantoj samtempe agrablajn kaj utilajn tekstojn, kaj oni ĉiam revenas al diraĵo de Horacio, ke oni kunigu agrablecon kun utileco.

KONTAKTO pritraktas seriozajn, aktualajn problemojn de nia homarana perspektivo. La artikoloj ne celas esti simple “distraj” – ili parolas serioze kaj profesinivele al nia konscienco. Sed, mia opinio, absolute rezigni pri la “movadeca karaktero” estas mortiga por niaj revuoj.

KONTAKTO petas, ke oni ne sendu al ĝi “primovadajn raportojn” (ilin ja aperigas *TEJO Tutmonde*). Tiu anonco, mia opinio, estas konfuzo: oni do povas konkludi, ke nia problemaro

estas aŭ tro klara aŭ neinteresa. Mi tamen komprenas la anoncon alie: tiu ĉi bona revuo estas ja pormovada kaj primovada en larĝa senco. Oni akceptas *diskutojn, debatojn*, sed ne *raportojn*. La lastaj estas foje vere sensignifaj, klubaj kaj hobiistaj (“Nia grupo faris ekskurson, kaj la organizanto estis mi” ktp.; foje aperis eĉ la jena anonco: “Grupo de TEJO vizitis Portugalon kaj trinkis barelon da biero”). Rezigni pri *tiaj* raportoj certe ne signifas rezigni pri Esperanta spirito de la revuo. Oni do ne kredu, ke *KONTAKTO* estas ne-primovada – ĝi nur ne volas ripeti la informojn, kiuj jam aperis en aliaj E-revuo. La redakcio kredeble diras: “Ne sendu al ni *mortajn* informojn – bv. sendi informojn, kapablajn krei aliajn informojn (t.e. diskutojn, komentojn, opiniojn...). Tion la redakcio jam parte faras – rigardu “temojn de la venontaj numeroj”, p. 2.

Mi kredas, ke la revuo por junularo povus esti iom pli evidente movada, pli pasie esperantista, pli batalema, defendanta la principojn kontraŭ pesimismaj, eĉ kapitulacantaj opinioj. Se mi estus redaktoro de *KONTAKTO*, mi farus la jenajn invitojn al la legantoj:

“*Karaj legantoj, en Esperantujo oni povas legi aŭ aŭdi la jenajn opiniojn:*

– la E-movado ne postvivis la jaron 2045.

– E-o ne devas celi al *disvastiĝo*, ĝi restu nur hobia.

– la E-movado evoluis ĝis certa punkto kaj poste ĉesis evolui, samkiel vivantaj organismoj.

– E-o ne povas havi *pacajn kaj amikecojn funkciojn* (ĉar vidu kiel interbatalas ankaŭ *samlingvanoj*!).

– E-o, samkiel iu ajn ideo, ne

povas batali kontraŭ ekonomiaj kaj armeaj fortoj, kiuj celas kaj atingas hegemonion.

– E-o ne taŭgas kiel “la dua lingvo” por nuntempoj ktp.

Kiu povas verki por *KONTAKTO* seriozajn kritikajn analizojn de *tiaj* opinioj?”

Tiuj artikoloj, bedaŭrinde, ne troveblas aliloke. Ili ne estas “raportoj”. La revuo fariĝus pli grava por ni, se ĝi estus movada, sed altnivele. Iom da hobiismo, certe, ne damaĝus, sed ĉi-rilate ni ne povas konkurenci kun naĉlingvaj revuoj – pli riĉaj, pli ampleksaj, pli bone kaj pli rapide informantaj.

I.F. BOCIORT, Germanio

Kara S-ro BOCIORT,

Mi tre dankas vin pro viaj laŭdoj pri *KONTAKTO* – ni klopodas ĉiam liveri interesajn kaj pensigajn artikolojn pri seriozaj, aktualaj temoj. Kaj mi vere dubas, ke iu povus nomi *KONTAKTO*-n simple “distra legaĵo”.

Mi respektas vian ideon, ke la vorto “movado” estu uzata pli larĝsence en nia komunumo por inkluzivi la pli altajn, homaranajn celojn de nia “movado”. Sed ni kiel individuoj ne povas laŭvole ŝanĝi la signifon, kiun la vorto alprenis dum sia historia evoluo. Kaj la fakto estas, eble bedaŭrinde, ke “E-movado” por multaj el ni signifas klubojn, asociojn, kongresojn, konferencojn kaj ja amatorecon. Kiam la redakcio de *KONTAKTO* diras, ke nia revuo ne estas “movadeca”, tio signifas, ke ĝi ne temas (kaj ja neniam temu) pri la internaj funkcioj, politikaj disputoj de nia movado aŭ nia komunumo. Tio, kompreneble, ne signifas, ke la enhavo de

KONTAKTO ne esprimu homaranecan vidpunkton, eĉ male. Sed ja ekzistas homoj ekster nia komunumo, kiuj dividas niajn homaranecajn idealojn, dum eĉ en nia lingvokomunumo troviĝas homoj, kiuj ne dividas ilin. *KONTAKTO* celas ponti inter la gravaj problemoj de la tuta mondo kaj nia komunumo, por ke ni simple ne restu enŝlositaj en nia fermita rondo, disputantaj pri “finvenkismo” kaj “raŭmismo”.

Mi opinias, ke la temoj, kiujn vi listigis, estas ja tre gravaj kaj diskutindaj. Mi mem tre interesiĝas pri ili, sed tamen mi ne volus legi pri tio en *KONTAKTO*... Troviĝas ja pli konvenaj eldonaĵoj por tiuj temoj: ili perfekte konvenas al la revuo *Esperanto* kaj, se temas pri junularo, – al *TEJO Tutmonde*.

Mi tamen opinias, ke vi eraras pri tio, ke tiuj artikoloj ne troveblas aliloke... Ĉu vi ne legas la revuon *Esperanto*? Ili ja estas konstante pritraktataj tie kaj nome en *Esperanto* estas la ĝusta loko por ili. Se ankaŭ *KONTAKTO* pritraktus tiajn temojn, ĝi simple reproduktus la revuon *Esperanto*. Tiam nia revuo perdus sian ekzistokialon kaj devus malaperi. *KONTAKTO* plenumas tre specialan funkcion kiel soci-kultura revuo en Esperanto, kio ja elstarigas ĝin kiel unikajon. Se ni alprenus movadajn diskutojn kaj disputojn, ĝi simple eniĝus kun la amasego da jam ekzistantaj movadaj revuoj.

Kiel vi legis en la redaktora saluto, mi nun estas la nova redaktoro de *TEJO Tutmonde*. Mi treege bonvenigas ne nur “movadajn raportojn” sed ankaŭ pli altnivelajn diskutojn pri la temoj, kiujn vi proponis.

Joel Amis, Usono/Nederlando

FARIĜU KONSCIA SUBTENANTO DE TEJO!

fariĝu patrono de TEJO

Pagante trioblon de vialanda MJ(-T)-kotizo vi ne nur subtenas la esperantistan junularon; de TEJO vi ankaŭ ricevas:

- revuon *KONTAKTO*
- bultenon TEJO Tutmonde (oficiala organo de TEJO)
- akcepton dum la ĉiujara Universala Kongreso
- aliajn laŭkajajn servojn kaj publikigaĵojn

Ĉu vi serĉas korespondamikon?

Sendu al *Koresponda Servo Mondskala* jenajn detalojn: nomo, adreso, sekso, aĝo, profesio, geedza stato, kiom da korespondantoj vi deziras, en kiuj landoj kaj pri kiuj temoj. Munsendu 2 internaciajn respondkuponojn, aŭ, se ili ne estas aĉeteblaj en via lando, neuzitan poŝtmarkon. KSM pludonos viajn informojn al alia(j) korespondemulo(j), kiu(j) konformas al viaj deziroj. Vi ricevos rektan respondon. KSM estas servo de UEA.

Skribu: **Koresponda Servo Mondskala, B.P. 6, FR-55000 Longeville-en-Barrois, Francio**

Kotiztabelo de UEA por 2004

Lando/valuto	MG	MJ(-T)	MA(-T)	SA	Kto	SZ
Argentino/eŭro	4	10	25	15	9	50
Aŭstralio/dolaro	14	36	89	53	32	178
Aŭstrio/eŭro	8	20	50	32	19	100
Belgio/eŭro	8	20	50	32	19	100
Brazilo/eŭro	4	10	25	15	9	50
Britio/pundo	5	13	32	20	12	64
Bulgario/eŭro	4	10	25	15	9	50
Ĉeĥio/krono	175	440	1100	660	395	2200
Danio/krono	60	150	370	235	140	740
Finnlando/eŭro	8	20	50	32	19	100
Francio/eŭro	8	20	50	32	19	100
Germanio/eŭro	8	20	50	32	19	100
Greklando/eŭro	8	20	50	32	19	100
Hispanio/eŭro	8	20	50	32	19	100
Hungario/forinto	1300	3200	8000	4800	2900	16000
Irlando/eŭro	8	20	50	32	19	100
Islando/eŭro	8	20	50	30	18	100
Israelo/eŭro	6	16	40	24	14	80
Italio/eŭro	8	20	50	32	19	100
Japanio/eno	900	2200	5500	3300	2000	11000
Kanado/dolaro	12	30	75	45	27	150
Nederlando/eŭro	8	20	50	32	19	100
Norvegio/krono	65	165	415	250	150	830
Nov-Zelando/dolaro	17	44	109	65	39	218
Pollando/eŭro	4	10	25	15	9	50
Portugalo/eŭro	8	20	50	32	19	100
Rusio/eŭro	4	10	25	15	9	50
Slovakio/krono	200	500	1250	750	450	2500
Svedio/krono	80	190	480	310	185	960
Svislando/franko	12	31	78	47	28	156
Ukrainio/eŭro	4	10	25	15	9	50
Usono/dolaro	8	20	50	30	18	100
TARIFO A/eŭro	5	13	33	20	12	66
TARIFO B/eŭro	4	10	25	15	9	50

ALIAJ LANDOJ: Luksemburgio laŭ Belgio; San-Marino laŭ Italio; Liĥtenŝtejno laŭ Svislando.

TARIFO A: Honkongo, Korea Respubliko, Malto, Singapuro, Sud-Afriko, Tajvano.

TARIFO B: Ĉiuj ceteraj landoj ne jam menciitaj.

Mallongigoj:

MG – Membro kun Gvidlibro

MJ – Membro kun Jarlibro

MJT – MJ malpli ol 30-jara (individua membro de TEJO; ricevas ankaŭ la revuon *KONTAKTO* kaj la bultenon *TEJO tutmonde*)

MA – Membro-Abonanto (ricevas la Jarlibron kaj la revuon *Esperanto*)

MA-T – MA malpli ol 30-jara (individua membro de TEJO; ricevas ankaŭ la revuon *KONTAKTO* kaj la bultenon *TEJO tutmonde*)

SA – Simpla abono de revuo *Esperanto* sen membreco

Kto – Simpla abono de revuo *KONTAKTO*

SZ – Societo Zamenhof (subtena kotizo aldone al membrekotizo)

PT – Patrono de TEJO: 3-oblo de MJ (ricevas *KONTAKTO* kaj *TEJO tutmonde*)

DM – Dumviva Membro: 25-oblo de MA (ricevas dumvive la samon kiel MA)

DMJ – Dumviva Membro kun Jarlibro: 25-oble de MJ (ricevas dumvive la samon kiel MJ)

Kiel individuaj membroj de TEJO (MJ-T aŭ MA-T) por 2003 estos registritaj tiuj individuaj membroj de UEA, kiuj estos malpli ol 30-jaraj la 1an de januaro 2003 (t. e. kiuj naskiĝis en 1973 aŭ poste). Ankaŭ Dumvivaj Membroj samtempe membras en TEJO, dum ili estas malpli ol 30-jaraj.

Eblas aboni ankaŭ la *TEJO tutmonde* sen membreco en TEJO. La abonprezo estas duono de la MJ-kotizo por la koncerna lando.

Oni povas pagi pere de la perantoj de UEA, aŭ rekte al UEA per ĝiro al ĝia banka aŭ poŝta konto, per ĉeko aŭ poŝtmandato, aŭ per kreditkarto.

JUNA AMIKO – internacia e-revuo de ILEI por lernejoj kaj komencantoj

– aĝas 30 jarojn kaj aperas 4-foje jare (marto, junio, septembro, decembro) sur 28 plurkoloraj paĝoj kun plenkoloraj kovriloj;

– havas kunlaborantojn el ĉiuj kvin kontinentoj;

– rabato ĝis 50%!

Karakterizas ĝin:

modela stilo kaj facila lingvaĵo (1500 vortradikoj sen glosoj), **enhavo tre varia:** rakontoj, fabeloj, raportoj, informoj, interesaĵoj, enigmoj, kvizoj, versaĵoj, ludoj, kantoj, humuro, lingvaj konsiloj, interkulturo, kuriozaĵoj, voĉo de legantoj k.a. kun multaj ilustraĵoj.

JUNA AMIKO estas fonto de taŭgaj legaĵoj por komencantoj, fidinda helpilo por E-kursgvidantoj.

Vizitu nian TTT-ejon: <www.junaamiko.inf.hu>!

Kiel sendi kontribuojn al *KONTAKTO*?

✓ sendu prefere tekston originale verkitan en Esperanto aŭ foton/bildon memfaritan

✓ se vi sendas tradukon, bv. indiki la originajn fontojn, lingvon kaj aŭtoron. Ĉe fabelo indiku, ĉu ĝi estas popola (kaj de kiu popolo) aŭ verkita de vi

✓ *KONTAKTO* ne estas movada revuo, do ne sendu al ĝi *primovadajn raportojn!*

✓ indiku, ĉu via artikolo jam aperis, aŭ estas proponata al alia revuo

✓ fotoj devas esti bonkvalitaj, ne gravas ĉu nigrablankaj, ĉu koloraj. Ne forgesu aldoni la nomon de la artisto aŭ de la fotinto!

✓ dikajn kovertojn prefere sendu registritaj

✓ rete bv. sendi vian artikolon kiel kutiman retmesaĝon aŭ RTF (bv. uzi x-kodigon por supersignaj literoj); bildojn – kiel JPEG (150-300 dpi)

✓ ilustraĵoj kaj adresoj en la Interreto, kiuj rilatas al via temo, estas tre bonvenaj! **Koran antaŭdankon!**

KONTAKTO: Dumonata socikultura revuo de **Tutmonda Esperantista Junulara Organizo** (TEJO), eldonata de **Universala Esperanto-Asocio** (UEA). **Fondita** en 1963. **N-ro 199** (2004:1), 41a jarkolekto. **ISSN** 0023-3692. **Legata** en ĉ. 90 landoj. **TTT-paĝo:** <<http://www.tejo.org/eldonoj.jsp>>. **Eldonanto** (administrado, abonoj, anoncoj): **UEA:** ☐ Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando; tel.: +31 10 436 10 44, fakso: +31 10 436 17 51; ret-adreso: <uea@inter.nl.net>. **Redakcio:** *KONTAKTO*, p/k 89, UA-01030, Kievo-30 Ukrainio; ret-adreso: <kontakt@tejo.org>. **Redaktoro:** Eugenia ZVEREVA (Ukrainio). **Vic-redaktoro:** Joel AMIS (Usono/Nederlando). **Cef-korektisto:** Pavel MOJAJEV (Ukrainio) **Kovrilo:** Aleksej KOBZENKO. **Presado:** SKONPRES, Bydgoszcz (Pollando), ret-adreso: <skonpres@poczta.onet.pl>. **Konstantaj kunlaborantoj:** Joel AMIS (Usono), Giancarlo BARALDI (Italio), Morteza MIRBAGHIAN (Irano), OSHÓ-DAVIES Oluwàbunmi (Nigero), SALIKO, (Finnlando), Behrouz Soroushian (Irano/Francio), ZHANG Xuesong (Ĉinio). **Facilingvaj artikoloj** estas verkita en la niveloj tre *facila kaj facila*, laŭ la vortolisto de *KONTAKTO*. Tiu listo aperas kun la unua numero ĉiujara. **Anonctarifo:** Tutpaĝa 350 EUR, 1/2-paĝa 190 EUR, 1/4-paĝa 100 EUR, 1/8-paĝa 55 EUR, 1/16-paĝa 30 EUR. Anoncoj sur kovrilpaĝoj kostas duoble. Por E-organizaĵoj 50% da rabato. Vartantoj de ekstermovadaj anoncoj ricevas maklerajon de 30 %. Por anoncoj bv. kontakti UEA. **Anonctoj:** por *Anonctabulo* kostas tri internaciajn respondkuponojn por dek vortoj. Bv. sendi rekte al la redakcio aŭ al UEA. **Abontarifo:** varias laŭlande. Petu informojn de UEA. **Malfortvidantoj:** povas ricevi voĉlegitan eldonon senpage. Sendu du 60-minutajn kasedojn al Elise LAUWEN, Fort Alexanderstraat 16, NL-5241 XG Rosmalen, Nederlando. **KONTAKTO en radioj:** Regiono / tempo (UTC) / metroj / frekvencoj (kHz): **Radio Havano (Kubo)** Okcidenta kaj Norda Ameriko kaj Pacifika Azio/ 7:00/31/9 820; Tuta Ameriko kaj Karibio / 15:00, 23:30/25/11 760; **Europo** Mediteranea/ 19:30, 22.00/21/13 715; <<http://216.138.240.229/rc4>> (je la 15a horo UTC), <http://roi.orf.at/esperanto/es_demand.html> (laŭ mendo tra la servilo de Aŭstria Radio Internacia). **Pola Radio:** elsendoj:13:30/41,23/7 275; ripetoj: 18:00/42.07/7 130; 20:00 kaj 9:30 sekvan tagon (nur per satelito). La satelita ricevo eblas per: Eutelsat II F – 6 – Hot Bird – 13 gradoj de la orienta latitudo; frekvenco 11,474 GHz, polarizado horizontala (H); subportanto 7,38 MHz. <<http://www.wrn.org/ondemand/poland.html>>, <http://www.radio.com.pl/polina/esperanto_eo.asp>, <<http://start.at/retradio>> **La redakcio kaj la eldonanto ne respondecas pri la opinioj de unuopaj aŭtoroj.**

